

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

102-a jaro • n-ro 1230 (11) • **Novembro 2009**

UEA ĉe Konferenco de neregistaraj organizoj



**Centjariĝo
de Ivo Lapenna**

**François Grin
pri Esperanto**

**Kongresa
Komuniko 1**

**Kalendaro
2009–2010**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofono:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
BIC: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

219 ... Centjariĝo de Ivo Lapenna (Baldur Ragnarsson)

220 ... La jaro de Lapenna (Josip Pleadin)

222 ... La granda oratora talento de Lapenna (Seán Ó Riain);
Ivo Lapenna ĉe "Youtube" (Birthe Lapenna)

223 ... Esperanto kiel parto de kompleksaj lingvopolitikoj (François Grin)

224 ... Kongresa Komuniko 1

225 ... Mallonga demandaro pri faka agado por inteligentuloj (kun eblaj
respondoj) (José Antonio Vergara)

226 ... Informa kaj instrua roloj de la esperantlingva radiofonio (Gabi Kosiarska)

227 ... Kalendaro 2009 – 2010

229 ... Belartaj Konkursoj de UEA: La branĉoj Kanto kaj Filmo (Humphrey
Tonkin); Belartaj Konkursoj de UEA en 2010

230 ... Recenzoj: Jorge Camacho pri *Japanio kalejdoskope*

231 ... Baldur Ragnarsson pri *Utila estas Aliĝo kaj La Asocio*.

233 ... Laste aperis

235 ... Oficiala informilo; UEA invitas prelegi en la Havana IKU-sesio;
Sonregistraĵoj de Lapenna serĉataj (Birthe Lapenna)

236 ... Renkontiĝo en Asten (Twan Gremmen kaj Ralph Schmeits); Konferenco
de neregistaraj organizoj en Meksiko (Martin Schäffer)

237 ... Modela tradicia semajno en Hispanio; Kubaj esperantistoj renkontiĝis
en Granma (esperantistoj el Bayamo)

238 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: En septembro (09.09.09) okazis en Meksiko la 62-a Konferenco
de neregistaraj konferencoj. Inter 1300-membra tutmonda delegitaro troviĝis
ankaŭ 6-membra teamo, kiu reprezentis UEA (legu pli sur la p. 236). Sur la foto
de Martin Schäffer pozas Neil Blonstein, David López Rueda kaj grupo da junaj
volontuloj.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala
planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T.
Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj,
edukado):** S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79
21 [h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino

Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,
NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori
Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27,
JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken,
Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José
Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto
Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h],
+56 65 344606 [of], ✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO:

S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI:

S-ro Stefan MacGill.

Centjariĝo de Ivo Lapenna

En 1951 Ivo Lapenna, estrarano de UEA, vizitis Islandon dum sia prelegvojaĝo tra Okcidenta Eŭropo. Li prelegis en la Universitato de Islando en Rejkjaviko kaj konatiĝis kun islandaj esperantistoj. Antaŭ sia foriro li havis okazon adiaŭi Islandon pere de la ŝtata radio. En tiu tempo mi estis gimnaziano en la norda urbo Akureyri, kaj ne havis tiam la eblecon lin renkonti.

Mi tamen hazarde aŭdis lian esperantlingvan adiaŭan paroladon en la ŝtata radio. Mi tiam jam sufiĉe lernis Esperanton por povi sekvi lian parolon, klaran kaj fortan. Tio estis mia unua sperto pri parolata Esperanto. Mi ankoraŭ bone memoras mian spontanegan reagon, kiu similis al tiu de la angla poeto Alfred Edward Housman je lego de virtuoza verso: rigidiĝis la haroj sur miaj vangoj.

Kiu estis tiu homo, kies voĉo, kies retoriko tiom ravis min, junulon? Iom poste mi akiris lian libron *Retoriko*, eldonitan en la antaŭa jaro. Sub la titolo mi legis: "Al esperantista junularo dediĉas la aŭtoro". Kiel bela dediĉo! Kiel instiga, kiel sprona al partopreno en unika aventuro, kvazaŭ rekte celita al mi mem! Por pli konkretigi por mi la aŭtoron mi gluis gazetan foton, supozeble tonditan el *Heroldo de Esperanto*, sur liberan paĝon fronte, kun la presita subskribo: "Ĉu vi konas ĉi tiun ridantan samideanon?" La foton sendis angla "samideano", kiu hazarde "kaptis" Ivon per sia aparato. Jen Ivo Lapenna, la aŭtoro de la libro *Retoriko*, junaspekta, en ĉemizo subkole aperta, kun la manikoj suprenfalditaj! En tiu tempo la vorto "samideano" ankoraŭ havis substancan valoron, kaj pro tiu subskribo Ivo Lapenna ĉiam poste restis en mia menso nur kaj simple kiel "samideano", liajn akademian kaj pliajn titolojn mi emis ellasi kiel flankajn formalajojn, kiuj ne koncernis min. Kiam, 37 jarojn poste, ni sidis kune en malgranda kunveno de akademianoj en Graz, mi havis tiun saman senton, li estis ankoraŭ por mi "samideano" en tiu gajanima junaĝa senco.

En 1950, la eldona jaro de *Retoriko*, Ivo Lapenna havis 41 jarojn. La centan datrevenon de lia naskiĝtago, la 5-a de novembro 1909, ni do havos post kelkaj tagoj. Tiun centjariĝon mi, kiel samideano, deziras honori per kelkaj vortoj. Mi tamen ne intencas provi pritrakti la brilan jursciencan karieron de Ivo Lapenna. Mi preferas teni min je lia esperantisteco, kiu plej intimis al lia koro ekde lia esperantistiĝo en 1928 ĝis lia morto la 15-an de decembro 1987. Dum ses jardekoj li pli-malpli, ofte intense, dediĉis sian vivon al Esperanto, private kaj publike. Lia karaktero, lia personeco tie ludis decidan rolon. Ivo Lapenna estis homo agema, energia, dinamisma, homo fidela al la praelo de Esperanto, kiun li viziis konkretigebla per avanca strategio. Ankaŭ lia kariero en la Esperanto-Movado estis avanca, ekde lia prezidanteco ĉe Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb baldaŭ

post lia esperantistiĝo, ĝis liaj respondecaj oficoj ĉe Universala Esperanto-Asocio kiel komitatano, estrarano, ĝenerala sekretario kaj fine prezidanto.

La etoso kreita post la rezolucio de Unesko en Montevideo 1954 ankoraŭ vivas en la memoro de multaj esperantistoj, junaj aŭ relative junaj en tiu tempo. Ivo Lapenna, tiam ĝenerala sekretario de UEA kaj ties reprezentanto en tiu konferenco, estis heroo, kiu entuziasmigis la esperantistaron ĝis senprecedenca optimismo. William Auld dediĉis al Ivo sian poemon *La Infana Raso*, kiu aperis en 1956, sed estis finverkita en januaro en la antaŭa jaro, "ĝuste tridek ok tagojn post via grandioza venko por nia afero ĉe Unesko". Mi bone memoras, kiel fervore mi legis en la la postajara januara numero de *Esperanto*, tiam izolita esperantisto en fora Islando, la aserton de la tiama prezidanto de UEA, Ernfrid Malmgren, ke per tiu rezolucio Esperanto havas apogon de Unesko. Sed kvankam fakte ne temis pri "apogo", sed nur pri "rekono", tio havis siajn pozitivajn sekvojn, konsultajn rilatojn inter UEA kaj Unesko, kiuj ankoraŭ daŭras kaj certe havas interesajn potencialojn. Plej indas memori la rolon de Ivo Lapenna en la akirado de tiu rekono.



Ivo Lapenna fariĝis prezidanto de UEA en 1964. Li tiam konceptis strategion, kiu antaŭenigu la atingojn ĉe Unesko al io pli grava ĉe la Asembleo mem de Unuiĝintaj Nacioj. Jam en 1950 UEA prezentis Peticion por Esperanto al UN, kun preskaŭ unu miliono da individuaj subskriboj kaj subteno de organizaĵoj kun ĉ. 15 milionoj da homoj. Tiun peticion UN plusendis al Unesko, kaj tial ĝi atingis la tagordon de ĝia konferenco en

Montevideo, kun la jam menciitaj sekvoj. Nun nova kampanjo estu lanĉita sub gvido de Ivo Lapenna por kolekti subskribojn por nova propono, kiu ĉi-foje atingis denove subtenon de ĉ. unu miliono da individuoj, sed la subteno de organizaĵoj estis multe pli granda ol antaŭfoje, kun preskaŭ 73 milionoj da membroj. Mi bone memoras, kiam mi vizitis la oficejon de la Islanda Laborista Federacio por peti subskribon de ties prezidanto, kiu estis favora al Esperanto; ne estis hezito ĉe li subskribi en la nomo de tiu Federacio. La propono estis transdonita sub gvido de Ivo Lapenna al la Sekretariato de UN la 6-an de oktobro 1966. Bedaŭrinde tiu grandega klopodo kolekti kaj organizi la peticion ne donis la esperatan rezulton, probable pro burokrataj reguloj. Kie ĝi kuŝas nun estas mistero, verŝajne ne gravas, ĉar ĝia aktualeco antaŭ longe vaporis for post pli ol kvar jardekoj.

Sed ne vaporis for la memoro pri Ivo Lapenna kiel elstara oratoro. "La retoriko transformas elokventecon en arton", li skribis fine de sia *Retoriko*. Feliĉe multaj liaj paroladoj estas konservitaj sur diskoj nun eldonitaj de Fondaĵo Ivo Lapenna. Lia voĉo tiel povas pluvivi por novaj generacioj de esperantistoj, same kiel liaj libroj verkitaj en la internacia lingvo, same kiel liaj atingoj por Esperanto, trans esperoj, elreviĝoj kaj konfliktoj.

Baldur Ragnarsson



La jaro de Lapenna

Precize la 27-an de julio 1974, do antaŭ iom pli ol 35 jaroj, en sia festparolado dum la Solena Inaŭguro de la 59-a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo, la lastan fojon oratoris antaŭ la membraro de "sia" Universala Esperanto-Asocio Ivo Lapenna, la ĝistiama prezidanto.

Tiu parolado, kiu por la neinformitaj kongresanoj estis samtempe neatendita kaj neligebla kun la forta personeco de la Prezidanto, stampis la tutan kongreson kaj markis ĝin kiel gravan

turnopunkton en la historio de UEA. La tutan epokon de post la Dua mondmilito ĝis tiu momento, verŝajne ni povas sen troigo nomi "la epoko de Lapenna". Ne necesas nuntempe konstrui miton pri Ivo Lapenna – lia postlasita heredaĵo pli klare parolas pri li mem kaj lia grandega kaj nemezurebla kontribuo al la Esperanto-movado, ol iu ajn scienca studo. Al Esperanto, kaj speciale al la konstruado de la moderna Universala Esperanto-Asocio, li dediĉis preskaŭ la tutajn vivon kaj forton. Certe li povas stari ŝultron apud ŝultro kun la plej grandaj figuroj de nia Movado, kaj en la tuta historio de UEA ne ekzistas pli brila stelo ol estis li. Des pli gravas nuntempe, en lia jubilea jaro, en la jaro de lia centa naskiĝdatreveno, rememori pri li kaj resumi la malĝojigajn eventojn el 1974, kiuj distancigis lin de UEA, kaj kiuj ja estas makulo nepre forigenda.

Naskiĝinte en aristokrata familio en la dalmata urbo Split, la 5-an de novembro 1909, dotita per multaj talentoj, dum la tuta vivo li estis escepta persono. Bonegaj notoj en la elementa lernejo, en la klasika gimnazio kaj la jura fakultato de Zagrebo, sukceso en la inernacijura fako kaj brila kariero de universitata profesoro, estas nur skeleto de lia vivo. Multe

da "karno" kroĉiĝis al tiu skeleto ĝis lia forpaso la 15-an de decembro 1987 en Kopenhago.

Por ni, esperantistoj, plej gravas lia esperantista kariero, kiu estis same brila kiel la profesia, se ne eĉ multe pli. El amaso da simplaj esperantistoj, la figuro de Ivo Lapenna elstariĝis jam komence de la 1930-aj jaroj en lia devenlando (tiam Jugoslavio). Kvankam liaj antaŭuloj certe devenis el Italio, li ĉiam konsideris sin kroato, kaj des pli grandas mia fiero kaj la fiero de ĉiuj kroataj esperantistoj.

Post la diplomitiĝo en Zagrebo en 1932 kaj doktoriĝo en 1933, li estis praktikanto en advokataj oficejoj, sed multe pli grave: tiutempe li estis jam forte konvinkita esperantisto, kaj liaj ideologiaj ĉefartikoloj en *La Suda Stelo* fortigadis la jugoslavian esperantistaron. Liaj enormaj oratora kaj organiza kapabloj estis en la servo de la landa movado. Dum kaj tuj post la Dua mondmilito li faris brilan politikan karieron, kaj unuavide ne klaras kial homo kun tiaj kapabloj kaj tia socia rango elmigris el sia patrolando. Ekde 1949, ekskluzive pro politikaj kaŭzoj, pro malkonsento kun la jugoslavia reĝimo, li elmigris, unue al Francio, kaj poste al Britio, kie li trovis sian duan patrujon, kaj ĝis sia pensiĝo en oktobro 1977, li laboris kiel lekciisto, docento kaj poste kiel profesoro pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en The London School of Economics and Political Science en Londono.

Esperanton li eklernis en 1928 kiel 17-jarulo, en 1929 fondis la faman Akademian Esperanto-Klubon en Zagrebo kaj ekde tiam dum pluraj jaroj li estis elstara gvidanto de la studenta Esperanto-movado internaciskale. Li prezidis la jugoslavian



Juna Ivo Lapenna



Ivo Lapenna ludanta



Lapenna kaj Tonkin en

landan asocion Jugoslavia Esperanto-Ligo (1937-1941), de post 1938 li estis komitatano de Internacia Esperanto-Ligo kaj unu el la ĉefaj personoj en la reunuiĝo de IEL kaj UEA al la nova Universala Esperanto-Asocio (1949), per kio solviĝis la organiza skismo. Landnivele post la Dua mondmilito, en nuraj kvar jaroj antaŭ sia elmigro al Francio, li sukcesis refondi en 1945 Kroatian Esperanto-Ligon kaj fondi la zagreban societon "Bude Borjan" samjare, refunkciigi la dummilite neaperintan *La Suda Stelo*, organizi la unuajn landajn kongresojn. Sed, tio ne sufiĉis por homo kun tiel energia naturo. Lia personeco ekbrilis nur tiam, kiam li sukcesis fariĝi unu el la gvidaj figuroj de la internacia Esperanto-movado.

En la reunuiĝinta UEA li estis komitatano de 1947 ĝis 1950. El tiu tempo datiĝas liaj gravaj iniciatoj, kiuj ankoraŭ nuntempe funkcias: Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj, Oratoraj Konkursoj. Tiutempe li multe kampanjis por Esperanto en internaciaj organizaĵoj, sed samtempe en 1950 kaj 1951 li intense prelegvojaĝis tra la eŭropa kontinento, kaj fondis Centron por Esploro kaj Dokumentado (1952), sen kies helpo ne eblus la plej brila momento de lia kariero – Montevideo. Post 1954, kiam en la urugvaja ĉefurbo la ĝenerala konferenco de Unesko akceptis Rezolucion pri Esperanto, li akiris la titolon "heroo de Montevideo" kaj fariĝis ĝenerala sekretario de UEA. Ekde tiu momento, en nur dudeko da jaroj, el UEA havanta la sidejon en periferia vilaĝo, li konstruadis potencon kaj respektindan organizaĵon, kiu en "lia tempo" atingis sian kulminon. UEA ĝuste bezonis tian personon, kiu havis samtempe grandajn sciojn kaj kapablojn, sed ankaŭ nerompeblan volon por dediĉi sin plene al Esperanto. En la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj unu post alia sekvis la rezultoj de lia laboro: en 1955 la nova moderna Statuto de UEA kaj la Unua Baza Laborprogramo, en 1956 la Principaro de Frostavallen, en 1957 Koresponda Servo kaj Magnetofona Servo, en 1959 impona festo en la jubilea Zamenhof-Jaro, en 1961 aĉeto de domo en Roterdamo, en 1963 kaj 1964 Dua Arta Festivalo kaj ekeldono de la revuo *Monda Kulturo* ktp. Lian laboron analizis multaj fakuloj, kaj

ĉiu faceto de lia vivo jam estas sufiĉe detale priskribita. Tamen, la faktoj post la jaro 1974, post lia demisio el ĉiuj funkcioj en UEA, restis nesufiĉe sobre pritaksitaj.

Paradokso de la evento en Hamburgo estis, ke ambaŭ movadaj fluoj tie kunfrapiĝintaj parte pravis, sed ne trovis kompromison. Ivo Lapenna, gvidata de sia senkompromisa fideleco al la Statuto de UEA, kiu alte taksis la neŭtralecon de la monda esperantista organizaĵo, tiu homo kiu por siaj idealoj multfoje en la vivo forlasis certan kaj plenperspektivan karieron, ankaŭ tiufoje rezignis pri la proponita honora prezidanteco, kredante firme, ke alvenas "nigraj tagoj" por UEA, kiujn li skizis en la konata "aprila artikolo".

Paradokse, heredis de li la prezidan postenon ĝuste la persono, kiu mem estis lia favorato – prof. Humphrey Tonkin. Bedaŭrinde, ke la ŝanĝo okazis en tiaj cirkonstancoj, ke neniu el la du prezidantoj, la eksa kaj la nova, povis senti fieron kaj kontenton. La prezidanto Tonkin daŭrigis la ideojn de Lapenna, kaj el la epoko de Lapenna multaj aferoj daŭre, en novaj cirkonstancoj, funkciis, sed la movada skismo kaŭzita de la foriro de Ivo Lapenna, tamen lasis amarajn efikojn. La membraro dissplitiĝis, parto el la membroj de UEA ekisigis kaj neeviteble Lapenna devis fondi novan organizaĵon – Neŭtrala Esperanto-Movado. Per sia gazeto *Horizonto* kaj la konferenco de NEM, Ivo Lapenna daŭrigis sian laboron por neŭtraleco en la Esperanto-Movado. Kelkfoje dum tiuj jaroj la reprezentantoj de UEA kaj Ivo Lapenna provis trovi komunan lingvon, sed Esperanto ne donis al ili ŝancon por interkompreniĝi.

Post la tempa distanco de 35 jaroj, certe la Esperanto-movado jam bezonas interpacigon. Necesas sobre kaj senbare pripensi kaj pristudi la rolojn kaj la faktojn, kaj elstarigi la bonajn rezultojn de la laboro de Ivo Lapenna. La homa socio evoluas kun ĉiaspecaj stumbloj, kaj la rezulto de niaj agadoj ofte videblas kaj klaras nur post paso de multaj jaroj. Ivo Lapenna nepre devas ricevi sian meritatan lokon inter la plej grandaj figuroj de la Esperanto-movado, kaj tiun lokon al li devas garantii ne nur la Movado, sed antaŭ ĉio UEA mem. Mi ĝojas rimarki, ke tiu procezo komenciĝis.

Josip Pleadin



1966



Lapenna en Hamburgo



Lapenna kun Sadler



Ivo Lapenna parolanta

La granda oratora talento de Lapenna

Mi ne havis la plezuron konatiĝi persone kun Profesoro Lapenna, sed estas por mi granda honoro verki kelkajn liniojn pri lia elstara oratora talento.

En sia verko *Retoriko* Lapenna brile instruas la parolarton, kaj en *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj (EPKP)* li montras kiel praktiki ĝin. Ni mallonge substreku du punktojn: unue, gravan elementon por ekoratori; kaj due, gravan kaj daŭran rezulton de la oratora talento de Lapenna.

En 1961, en sia parolado al la 46-a UK en Britio, Lapenna altiris atenton al la plej grava unua paŝo por fariĝi oratoro – simple praktiki la lingvon! Mi citas (EPKP, p 77): "... precize pro la komencantoj oni devus ĉiam, en ĉiuj niaj organizaĵoj, praktiki nur la internacian lingvon." Ŝajnas evidenta afero uzi nur Esperanton dum Esperanto-kongreso aŭ kunveno,



aparte kun samlandanoj, se ni ne volas produkti eternajn komencantojn. Sed ĉu ni ĉiuj tiel faras?

Due, unu konkreta rezulto de la oratora talento de Lapenna estis sendube lia fama venko en Montevideo en 1954, la unua venko de Esperanto ĉe tutmonda internacia organizaĵo. Kiel skribis Kalocsay:

*Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva...
Indigna, sed trankvilkonserva
Pri l' aĉa Blinkenberg-burlesko.*

Kial ni ne revivigu la verbon "blinkenbergi", en la senco "longe, antaŭjuĝplene kaj sensciencbaze paroli kontraŭ Esperanto", kiel faris Blinkenberg en Montevideo? Ja la blinkenbergoj ne malaperis, kaj eĉ okupas altajn postenojn. Lapenna montris al ni la vojon. Ni sekvu ĝin! Ni fosu nian sulkon! Ni "lapennu" la blinkenbergojn!

Seán Ó Riain

Ivo Lapenna ĉe "Youtube"

En tiu ĉi jaro oni festas la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna, unu el la plej elstaraj figuroj de la Esperanto-historio, fondinto de la moderna UEA kaj "venkinto en Montevideo".

Lige al la jubileo estas ciferecigitaj kelkaj filmoj pri prelegoj de Lapenna, kaj ili estas deponitaj en plurpartaj serioj ĉe la servilo Youtube. La adresoj de la filmoj estis aldonitaj al la retejo www.ivolapenna.org. Jen la atingeblo de unuopaj eroj: Por Monda Komunikado en Paco kaj Libero 1(2): www.youtube.com/watch?v=G_YQerUaso8. Por Monda Komunikado en Paco kaj Libero 2(2): www.youtube.com/watch?v=r2hFp1v9H0Y. Kial Paco en Libereco 1(3): www.youtube.com/watch?v=xN-qyklyUxM&feature=related. Kial Paco en Libereco 2(3): www.youtube.com/watch?v=5bnoNuDbIT0&feature=related. Kial Paco en Libereco 3(3): www.youtube.com/watch?v=FfvOboEetBs. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Metz, 1985, 1(4): www.youtube.com/watch?v=3Eh7UhpeKI0. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Metz, Francio, 1985 2(4): www.youtube.com/watch?v=z3H_LyyDYb0. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Metz, Francio, 1985 3(4): www.youtube.com/watch?v=SWjFwWVMHqs. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Metz, 1985, 4(4): www.youtube.com/watch?v=2XAXqyRnmrl. Rezolucio de Unesko 1(11): www.youtube.com/watch?v=kZG0utsazJQ. Rezolucio de Unesko 2(11): www.youtube.com/watch?v=eiaqPaEhmo. Rezolucio de Unesko 3(11): www.youtube.com/watch?v=JmrrvCoVhwU. Rezolucio de Unesko 4(11): www.youtube.com/watch?v=jgUVDfX7yMw. Rezolucio de Unesko 5(11): www.youtube.com/watch?v=D9KKKgoAVb0. Rezolucio de Unesko 6(11): www.youtube.com/watch?v=DUMbi8qw4r0. Rezolucio de Unesko 7(11): www.youtube.com/watch?v=HGQU1wzOCKA. Rezolucio de Unesko 8(11): www.youtube.com/watch?v=_XeKb50JIUY. Rezolucio de Unesko 9(11): www.youtube.com/watch?v=SP8_aglDjFM. Rezolucio de Unesko 10(11): www.youtube.com/watch?v=TRaqo3O5YyM. Rezolucio de Unesko 11(11): www.youtube.com/watch?v=mFeKi8BzW0o. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 1(6): www.youtube.com/watch?v=mVmx2iDJ--Y. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 2(6): www.youtube.com/watch?v=SriTMIInpHw. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 3(6): www.youtube.com/watch?v=fFN2FsWnQU. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 4(6): www.youtube.com/watch?v=A6eU7gGwFE. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 5(6): www.youtube.com/watch?v=Kl-tfcl9TT8. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en Leeuwenhorst, 6(6): www.youtube.com/watch?v=pCc9TmtBRGA. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 1/6: www.youtube.com/watch?v=RVtgp7BLnGk. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 2/6: www.youtube.com/watch?v=3MNjFClK5kk. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 3/6: www.youtube.com/watch?v=2eR06FA6L2o. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 4/6: www.youtube.com/watch?v=O3S6yV6sybc. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 5/6: www.youtube.com/watch?v=Z7AvO-OXnAg. Cent Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo 6/6: www.youtube.com/watch?v=3irA9K_lYSk. Esperanto Kiel Lingva Esprimo kaj Instrumento de Humaneca Internaciismo 1/3: www.youtube.com/watch?v=ytCiPjMnGfO. Esperanto Kiel Lingva Esprimo kaj Instrumento de Humaneca Internaciismo 2/3: www.youtube.com/watch?v=GgFSLCnVY9s. Esperanto Kiel Lingva Esprimo kaj Instrumento de Humaneca Internaciismo 3/3: www.youtube.com/watch?v=toSvZeyv-I. La Arĝenta Pokalo. La Internacia Jubilea Esperanto-Kongreso en Graz, Aŭstrio, 1987: www.youtube.com/watch?v=h4bX_QOXySM. 30-jara datreveno de akcepto de Montevidea Rezolucio de Unesko favore al Esperanto kaj Unesko hodiaŭ: www.youtube.com/watch?v=peV2HmVnScE. Volonte staras je via dispono



www.youtube.com/watch?v=peV2HmVnScE. Birthe Lapenna, lapenna@mail.dk

Esperanto kiel parto de kompleksaj lingvopolitikoj

Parolado de prof. François Grin okaze de la reinaŭguro de la tabulo memore al L.L. Zamenhof en Ĝenevo, strato Vieux-Colège 12, la 28-an de aŭgusto 2009.

Sinjoro Urbestro, Gesinjoroj,

Kiam komence de la somero mi ricevis la inviton por diri kelkajn vortojn okaze de la reinstalo de la tabulo, kiu memorigas la restadon de L.L. Zamenhof en nia urbo, mi estis iomete surprizita. Unue ĉar ĝis nun mi malatentis la ekziston de tabulo en Ĝenevo, kiu memorigas la restadon de la fondinto de Esperanto, sed precipe ĉar mi estas nenia specialisto de Esperanto. Bedaŭrinde mi ne parolas tiun lingvon, mi ankaŭ ne estas ano de iu esperantista klubo, kaj mia unua reago estis diri, ke ekzistas homoj multe pli taŭgaj ol mi por interveni en tiu okazo.

Sed la organizantoj tamen vidis sencon, ke mi diru kelkajn vortojn. Se la kelkaj pensoj, kiujn mi povas dividi kun vi, ne rilatas la vivon de Zamenhof, nek Esperanton mem, ili ja koncernas la kontribuon de Esperanto, kiun ĝi povus fari en la solvado de gravaj demandoj sur la kampoj socia, politika kaj eĉ ekonomia.

Mi do ŝatus diri al vi kelkajn vortojn pri Esperanto, sed sub la aspekto de la lingvopolitiko.

Unue: La lingvopolitiko estas la vasta kampo, sur kiu oni pripensas kaj agadas ekzemple rilate al la protektado de la minacataj lingvoj kiel la romanĉa, aŭ la gaela en Irlando.

Due: Ĝi estas ankaŭ la kampo, kiu tuŝas la debaton de la lingvoinstruado: kiu(j) lingvo(j) estu instruata(j) en la lernejoj sistemoj? Kaj inter ili kiuj lingvoj *unue*? En la tuta romanda Svislando la elekto estas klara: unue la germana kaj poste la angla. Sed tio ne estas klara en certaj kantonoj de la alemana Svislando, kie oni decidis unue elekti la anglan lingvon.

Trie: La lingvopolitiko okupiĝas ankaŭ pri tiaj demandoj kiel apliki lingvojn por la komunikado en organismoj plurlingvaj. Tuj oni pensas, kompreneble, pri Eŭropa Unio kun ĝiaj 27 membroj kaj 23 oficialaj lingvoj: temas pri problemo, kiu nomiĝas *multlingva komunikado*.

Ĝuste vide al la ĉi-lastata punkto Esperanto estas interesa por konsideri – ne en la senco de unika kaj totala solvo, sed kiel ekstreme utila elemento de solvo.

En la diskuto pri multlingva komunikado estas efektive konsiderataj ĝenerale tri solvo-proponoj:

Unua: *Traduki kaj interpreti komplete kaj ĉiurilate*. Tio estas ebla, sed sufiĉe peza afero. En iuj cirkonstancoj temas pri brila solvo, en aliaj ĝi malfaciligas kaj bremsas la komunikadon (ekzemple la funkciadon de malgrandaj laborgrupoj).

Due: *Instigi la homojn fariĝi multlingvaj*. Ĉi tiu ideo estas brila, se ĝi funkcias, *en principo*, en la kunteksto kie ne estas uzataj tro da lingvoj (kiel ekzemple en la svisa federacia administracio de Berno); sed tiu solvopropo estis nesufiĉa kiam oni havas

multajn lingvojn (kiel en la eŭropaj institucioj de Bruselo). Estas neeviteble, ke la homoj volas "graviti" al malgranda nombro de lingvoj, kaj tio necese kaŭzas, ke ĉiuj aliaj lingvoj estas puŝitaj al la dua rango. Temas pri centripeta procezo: ĉi tiu gravita movo finiĝas per privilegiado de unu sola lingvo, malavantaĝe por ĉiuj aliaj.

Trie: Tial oni emas al ĉi tiu tria solvo: *utiligi nur unu solan lingvon, pli precize la anglan*. Nu, oni ja scias, ke ĉi tio signifas, eble paradokse, tre karan solvon, ĉar ĝi devigas pli ol 90 procentojn de la homaro, kaj 84 procentojn de la Eŭropa Unio, investi multan tempon kaj monon en la lernado de malfacila lingvo. La solaj, kiuj vere profitas, estas tiuj, kies gepatra lingvo ĝi estas. Kiel ili ŝparas? Ne lernante fremdlingvojn! Kaj ili povas permesi al si tion, ĉar estas la aliaj, kiuj fortostreĉas kaj foruziĝas por ili. Britio ŝparas miliardojn da eŭroj ĉiujare, ĉar oni ne plu serioze klopodas por lerni fremdlingvojn, krom en la kazo de tre mallarĝa elito.

Mi volas emfazi, ke la problemo ne estas la angla lingvo mem. La situacio estus la sama, se ne temus pri la angla, sed pri la franca, la estona aŭ la kirgiza, kiuj troviĝus en superrega pozicio. La vera problemo do estas la *lingva hegemonio*, sendepende de la lingvo aŭ la profito, kiun ĝi generas.

Nu, kion fari? Mi kredas (kaj cetere en tiu direkto orientiĝas la plej aktuala evoluo de la sciencaj esploroj pri la temo), ke necesas lerni trakti la *kompleksajn lingvopolitikojn, kiuj kombinas plurajn strategiojn*: a) kompreneble la lernadon de fremdlingvoj; b) la tradukadon kaj interpretadon tie kie ĝi estas necesa; c) ankaŭ lingvon kiel la angla, sed evitante superregan pozicion; ĉ) la evoluon nomatan "interkompreniĝo" (tio signifas legi kaj kompreni la lingvon de la alia sen devigo de parola aŭ skriba scipovo), kaj, kun tiuj diversaj rimedoj, d) ankaŭ Esperanton,

Esperanto do partoprenas en kompleksa strategio, kiu estas adaptenda al la diverseco de la situacioj de la komunikado. Ĉe Esperanto temas pri lingvo, kiu posedas konsiderindajn atutojn: lernfacilecon, sistemimanan flekseblecon kaj ĉefe la fakton, ke ĝi ebligas veran egalecon inter la parolantoj de diversaj lingvoj. Ĉi tiu egaleco eble ne estas perfekta (ĉar ekzemple la vortaro de Esperanto baziĝas precipe sur la latinidaj lingvoj), sed tiu ĉi egaleco de Esperanto estas multe pli vasta ol ĉe iu ajn alia lingvo.

Ĉio tio havas apartan gravecon por Ĝenevo kiel internacia urbo. Esti internacia urbo ne signifas, ke oni devas ĉion simple fari en la angla. Esti internacia urbo signifas esti multlingva urbo. Kaj kiel oni vidas, subteninda multlingvismo kondiĉigas kompleksajn lingvopolitikojn, kiuj konformas samtempe al pluraj strategioj. Kaj inter tiuj strategioj certe ekzistas loko por Esperanto, kiun Ludoviko Lazaro Zamenhof lanĉis antaŭ proksimume 120 jaroj.



**El la franca tradukis Andreas Künzli
foto Stefano Keller**



Kongresa komuniko 1

95-a Universala Kongreso de Esperanto Havano, Kubo, 17 – 24 julio 2010

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.

Retadreso: kongresoj@co.uea.org

TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html

Kongresa temo

La 95-a UK estos dediĉita al la Internacia Jaro de
Interproksimigo de Kulturoj, proklamita de UN kaj
Unesko.

Kongresejo

La kongreso okazas en Palacio de Convenciones, moderna
kongresejo kun ĝusta kapacito por la UK. Ĝi atingeblas
per publika transporto, taksio kaj busoj organizitaj de
UEA (el/al la hoteloj de la Dua Bulteno).

Vojaĝado

El eksterlando eblas atingi Havanon nur aviadile, kies
ĉefa flughaveno estas la Internacia Flughaveno José
Martí (HAV). De tie eblos iri al la urbo/kongresejo
per transporto ofertata de UEA aŭ taksie. La nacia
flugkompanio Cubana havos specialan tarifon por la
kongresanoj (pliaj informoj en la Dua Bulteno).

Loĝado

Informoj aperos en la Dua Bulteno, kiu ofertas loĝadon
de 5-stelaj ĝis modestaj, aparte malmultekostaj hoteloj.

Ekskursoj

Ankaŭ la priskriboj de la antaŭ-, post- kaj dumkongresaj
ekskursoj aperos en la Dua Bulteno. Inter la vizitotaj lokoj
estas historiaj urboj (ekz. Santiago de Cuba), Varadero
kaj malpli konataj (sed eĉ pli belaj) plaĝoj, la landinterno
de la insulo, Malnova Havano. Oni ankoraŭ esploras
pri antaŭ- aŭ postkongresaj aranĝoj en aliaj landoj de la
regiono.

IJK

La 66-a Internacia Junulara Kongreso (24-31 julio) okazos
en la feriejo Los Cocos, Santa Cruz del Norte. Ĝia ejo
troviĝas ĉemare, apud plaĝo, kaj havas proprajn naĝejon,
kafejon, restoracion kaj diverscele uzeblajn ĉambrojn.

Infana Kongreseto

Oni planas okazigi Internacian Infanan Kongreseton,
se oni atingos minimumon da partoprenantoj. Interesitoj
bv. kontakti la komisiiton pri IIK, Bert Schumann,
bert.schumann@free.fr.

ILEI-konferenco

La 43-a ILEI-konferenco (11-17 julio) okazos en la hotelo
Animao en Matanzas. Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe http://www.ilei.info/konferenco/2010/KUBO_Unua_bulteno.pdf.

Reklamiloj

La Unua Bulteno estis jam vaste distribuita kaj oni povas
ankoraŭ peti ĝin ĉe UEA. Glumarka folio kun 12 markoj
mendeblas ĉe la Libroservo de UEA por € 1,20 (rabato
de 1/3 ekde 3 ekz.; aldoniĝas la sendokostoj kaj, en EU,
impoto de 19%). En la reta kinejo de UEA, www.ipernity.com/home/97850, videblas 10-minuta filmo pri Kubo,
Havano kaj la kongresejo.

Aliĝilo

Aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe la Centra
Oficejo, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado
kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. Eblas ankaŭ elŝuti ĝin en
PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo, kaj tie rete aliĝi al la
UK.

Kotizoj

Ĝis la 31-a de decembro validas jenaj kotizoj (interkrampe
tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj de UEA
(sed ne MG) € 160,00 (120,00); MG-membro aŭ ne-IM
de UEA € 200,00 (150,00); Komitatano/kunulo/junulo/
handikapulo, IM de UEA, € 80,00 (60,00); Kunulo/junulo/
handikapulo, ne-IM de UEA, € 120,00 (90,00). Por Latina
Ameriko validas speciala tarifo: IM-UEA (ne MG) € 80,00;
MG aŭ ne-IM de UEA € 100; Komitatano, kunulo... IM de
UEA € 40,00; Kunulo, junulo... ne-IM de UEA € 60,00.
Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro
1989 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de dokumento). Pri
pagmanieroj vd. Jarlibro 2009 (p.38-39) aŭ www.uea.org/kongresoj/uk_pagmanieroj.html.

Statistiko

Ĝis la 15-a de oktobro estis registritaj 143 aliĝintoj el 35
landoj.

Mallonga demandaro pri faka agado por inteligentuloj (kun eblaj respondoj)

En la lasta UK en Bjalistoko, la Faka Forumo kaj la koncerna Subkomitato utilis kiel viglaj diskutejoj pri la senco, spertoj kaj ŝancoj de tiu "malriĉa parenco". Ĉar mi suspektas ke oni ne legis miajn antaŭajn ĉi-temajn artikolojn, jen kelkaj (iom provokaj) demandoj kaj miaj proponataj respondoj, fakte invitaj al diskutado.

1. Kial okupiĝi pri la faka agado por/ per Esperanto?

Nu, ĉar ju pli ni pledas (kaj mi estas konvinkita pri tio) ke Esperanto estas vera homa lingvo, potencie utiligebla en ĉiu sfero de la homa sperto, des pli ni klopodu fakte uzi ĝin diverskampe. Krome, se iu opinias sin movadano, estus bone do serĉi aŭ krei mem ŝancojn disvastigi Esperanton en la propra fakmedio. Se iu opinias sin ano de lingvokomunumo, tiu povas uzi la lingvon por kontaktoj kun homoj laŭfakte proksimaj aŭ similaj, eĉ kun la nura celo konatiĝi, interŝanĝi informojn, amikiĝi.

2. Sed kion entute oni komprenu per la termino "faka agado"?

Ĝi ne estas iu homogena kampo sed la termino fakte aludas al tre diversstipa terenaro, sur kiu montriĝas ke homoj kundividigas kaj Esperanton kaj iun kroman specifan trajton, kio ebligas ariĝon por diverscela kunlaborado. Temas pri apartaj intereso, kaj ŝatokupoj, profesioj, religiaj aŭ politikaj doktrinoj, personaj opcioj aŭ orientiĝoj ktp. Tiu aparta aplika kampo de Esperanto, malgraŭ siaj iama entuziasma ekaktiviĝo kaj diverskvalitaj atingoj, ankaŭ suferis fojajn krizojn, stagnoperiodojn kaj nun devas alfronti la samajn problemojn kaj minacojn kiel la ĝenerala E-movado, nome demografian maljuniĝon, marĝenecon, enfermitecon ktp.

3. Ĉu la fakaj grupiĝoj kontribuas al la diskonigo, videbligo aŭ prestiĝo de Esperanto?

Nu, iuj jes. Mi ofte citis la kazon de la vegetaranoj, kies TEVA modele estas plena membro de la Internacia Vegetarana Unuiĝo, kio i.a. ebligas al ĝi havi propran retejon en tiu de IVU (www.ivu.org/teva). Kiel simbolon ĝi uzas variaĵon de la

sama signo kiu identigas aliajn samcelajn asociojn, kaj aktive, varbocele partoprenas la vivon de la ĝenerala tiuidea komunumo, ekz. ties tutmondajn kongresojn. Do la Esperanta branĉo estas plena, normala parto de tiu movado. Simile, la Rotarianoj (RADE) sukcesis atingi oficialan rajtigon ene de tiu granda internacia reto el servokluboj de profesiuloj kaj entreprenistoj, lanĉis ene de ĝi la iniciaton "lingvaj ambasadoroj" por elstarigi la lingvajn problemojn kaj Esperanton, kaj eldonis nialingve libron pri la fondinto de tiu monda klubaro, kies gajno estos favora al projekto por poliovakcinado.

4. Kaj ĉu ili kontribuas al la kulturo kaj korpusa planado de nia lingvo?

Kelkaj el ili fakte jes, foje tre trafe kaj grave, kiel ekz. la fervojistoj (IFEJ, ĵus centjariĝinta), kiuj sukcesis publikigi Esperantan version de la tiufaka oficiala terminarego, laŭ la oficialaj laboroj de la Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC), kaj daŭre dediĉas seriozan atenton al tiu problemaro. Oni devas tamen agnoski ke ĉe multaj scio- kaj agobranĉoj, la terminologio en Esperanto estas subevoluinta, kaj do nia kutima distrustpetado ke Esperanto pretus por la alstrebata rolo kiel internacia lingvo fakte ne veras koncerne ilin.

5. Ĉu ilia argumentaro favora al Esperanto en la koncernaj fakmedioj estas taŭga?

Mi ne certas pri tio, kaj fakte forte dubas. Verŝajne oni emas simple insisti pri la klasika argumento ke ekzistus iu ununura lingva problemo en la mondo ĉar mankas komuna lingvo, kaj ke por tiu rolo pretas nia Esperanto. Tamen la situacio en la nuntempa mondo komplete ŝanĝiĝis, i.a. ĉar pro diversaj kialoj aparta



etnolingvo gajnas pli kaj pli da tereno en la internacia komunikado je altegaj kostoj por la parolantoj de ĉiuj ceteraj lingvoj. Dume, montriĝis pli trafe paroli pri lingvaj problemoj (ekz. diskriminacio al lingvaj minoritatoj), kies atentigo laŭ principoj de egaleco, diverseco kaj homaj rajtoj fariĝis kerna ideologia trajto de la Esperantomovado, kiel esprimite per la alvoko al lingva demokratio en la Manifesto de Prago. Eble estus necese ke la fakaj asocioj pripensu sin mem laŭ tiu nova idearo de nia movado.

6. Ĉu la fakaj asocioj devus do agadi kiel socie engaĝiĝintaj grupoj por lingva demokratio en siaj medioj?

Laŭ mi, tio estus interesa vojo, almenaŭ esplorinda. Ekzemple mi mem estas kuracisto, kaj iom envias la sukceson de grupiĝoj kiel la Internaciaj Kuracistoj por la Evito de Nuklea Milito (IPPNW, 1980) kaj la Internacia Societo de Kuracistoj por la Naturmedio (1990). Ĉu niaj fakaj E-grupoj ne trovas subtenon aŭ aliancinojn se ili aparte klopodus serĉi en siaj respektivaj kampoj ligojn kaj komprenemajn homojn por la batalo por lingvaj egaleco kaj ekologio? Esperanto estas ideo kaj praktiko kies esencon povas kompreni homoj aparte sentemaj al socia engaĝiĝo. Ekz. mi dirus al niaj komercistoj (IKEF) ke ja indas stimuli negocojn kun ĉinoj per Esperanto, sed krom tio, eble utilis paroli pri Esperanto al la asocioj de Justa Komercio inter riĉaj kaj malriĉaj landoj; mi kredas ke tiuj homoj estus pli komprenemaj al nia strebado.

7. Kaj kio direblas pri la organizaj problemoj?

La fakaj asocioj kutime havis strukturon similan al tiu de UEA, kun internacia tegmenta asocio, landaj sekcioj, apartaj kongresoj ktp. Kelkaj el ili plu funkciigas strukturon tian, verŝajne sukcese kaj utile (ekz. ILEI, IKUE). Aliaj tamen fariĝis tro malfortaj por io tia, kaj dume leviĝis ĝeneralaj demandoj pri tio kiel ĝisdatigi la

organizomodelojn en la Esperanto-movado, kiel profiti de la nunaj komunikteknologioj (ekz. interreto), ĉu la asocioj servu precipe la membrojn aŭ la celon, ĉu entute oni ĉiam bezonas tradician strukturon. Temas pri malfermaj demandoj. Bela iniciato de novaj, esplorindaj vojoj estas la surreta scienca revuo *Teleskopo* (www.teleskopo.com).

Mi kredas ke la agado de la fakaj asocioj estas kerne valora por nia komuna afero. Ni vidos kion ili raportos pri sia kontribuo tra la baldaŭ finiĝonta jardeko dum kiu validis la Strategia Laborplano de UEA 2001-2010. Temas pri trafa okazo, ĉar ni devas lanĉi novan por la sekva periodo, laŭ la nuna realo. **José Antonio Vergara**



Informa kaj instrua roloj de la esperantlingva radiofonio

**Atingas nin voĉoj,
ke estas bona
tradicio en aprilo
kaj novembro sur la
paĝoj de Esperanto
legi pri la programoj**

de la Esperantlingva Radiofonio. Verdire ekde la unuaj provoj disaŭdigi esperantlingvajn elsendojn antaŭ preskaŭ 90 jaroj multo ŝanĝiĝis. Teknologie ili nun malmulte similas al tiuj, kiujn kutimis aŭskulti la unuaj radiouzantoj ravitaj de la eblo aŭskulti en Esperanto novaĵojn el fremdlandaj radiostacioj.

La evoluo de la elektroniko kaj informadiko en la lastaj jaroj alportis laŭvican evoluigan antaŭenpuŝon. Ĝi ebligis ankaŭ al grupoj kaj individuoj pretigi voĉigitan programon, kiu daŭre estas difinata kiel radioelsendo. Hodiaŭ restis malmultaj publikaj radiostacioj, kiujn en sia programoferto konservas E-programojn. Eĉ se daŭre kelkaj el ili uzas por la programemisiado ekzemple mallongajn ondojn, samtempe ĉiujn ĉi programojn eblas jam aŭskulti per la Interreto.

Kvankam la evoluo de la informadiko ebligis la aperon de interretaj babilejoj, skajpo – permesantaj eĉ al multaj esperantistoj en lokoj izolitaj teni ĉiutagan kontakton kun personoj en aliaj mondpartoj – tio ne malgrandigis la allogon de la radioelsendoj. La rolo de la E-elsendoj, kiel natura lingvomedio restas nesubtaksebla. Kiel atentigis iu el la aŭskultantoj de E-elsendoj de PR, en la radia elsendo Esperanto estas uzata en ĉiutagaj cirkonstancoj, kaj tiu uzo estas lernebla nek per lernolibro, nek per kurso.

Do, krom la informa rolo la E-elsendoj plenumas ankaŭ gravan instruan kaj klerigan rolojn. Konfirmas tion konataj esperantistoj, kiam oni demandas ilin, kiel ili venis al Esperanto. Ekzemple Jiří Patera, Honora Membro de Ĉeĥa E-Asocio, en la 2-a numero de la ĉi-jara *Starto* i.a. konstatas: "mi ne devas forgesi, ke al mia esperantisteco multe helpis la E-elsendoj de iuj radiostacioj; certgrade mi estas memlernanto, instruita de

E-lingvaj radiostacioj". Bela anektdo estas la konfeso de Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA en la listo de la finnaj esperantistoj EAF, kie li i.a. skribis: "Mi reakiris n-ron 7/1969 de *Joka Poika*, en kiu aperis mia unua publikigita artikolo pri Esperanto, kelkajn monatojn antaŭ la UK en Helsinko. [...] Mencioj pri Esperanto aperis ofte en ĝi kaj dank' al ĝi mi lernis ankaŭ DX-aŭskultadon. Tiu hobbio kondukis min al la finnlingvaj programoj de Pola Radio kaj kiam mi malkovris, ke ĝi elsendas ankaŭ en Esperanto, mi decidis lerni la lingvon".

Tiun konstaton cetere Osmo Buller konfirmis publike en unu el el la kunvenoj de la lasta UK en Bjälstoko, respondante la demandon de la intervenanta Jo Haazen, ke UEA pli aktivu favore al la popularigo de la E-elsendoj kaj E-gazetoj regule aperigadu la informojn pri E-programoj de diversaj radiostacioj. Tiuj informoj efektive malmultiĝis en la lastaj jaroj. Des pli valoras mencii denove iujn titolojn de gazetoj, kiuj jen kaj jen informas pri la E-programoj, kiel *Norvega Esperantisto* aŭ *Esperanto*. Valoras, ke tiuj informoj pli regule aperu en diverslandaj periodaĵoj, tiel logante al la E-elsendoj ankaŭ la novajn esperantistojn, kiuj bezonas aŭskulti flue parolatan lingvon. Sufiĉus nur represi la retadresojn de la diverslandaj E-elsendoj, kaj instigi la legantojn serĉi la plej interesan programon por si.

Ja ni daŭre disponas pri la atentinda oferto de E-redakcioj. Ĉiutage elsendas Radio Ĉina Internacia. La varsoviaj E-elsendoj disponigas 5 labortagajn E-elsendojn. Trifoje semajne aŭdiĝas la programoj de Radio Vatikana. La aliaj, kiel Radio Havano kaj 3zzz, prilaboras unu programon semajne, kelkaj E-elsendoj aŭdiĝas neregule. Do, al ĉiuj, kiuj ne faris tion ankoraŭ, restas sole viziti la koncernajn (listigitajn sube) adresojn, konatiĝi kun la proponata programoferto kaj aŭskulti. Kaj kompreneble sendi reagojn, ĉar ili helpas al ĉiuj redakcioj prilabori ĉiam pli interesajn kaj altkvalitajn E-programojn.

Gabi Kosiarska

<http://esperanto.cri.cn> www.polskieradio.pl/eo
www.radiovaticana.org/it1/on_demand.asp?gr=esp
www.ameriko.org www.3zzz.com.au/staging/programs.aspx www.viavento.republika.pl/aktuale/sonmaterialoj.htm
<http://la-ondo.rpod.ru> <http://radioaktiva.esperanto.org.uy/category/podkasto> <http://parolumondo.com>
<http://radioverda.com>

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la aprila numero.

novembro:



21-22: Radioamatora Internacia Konkurso en ĉiuj radioamatoraj bendoj. ✉ ILERA, Internacia Ligo de E-Radioamatoroj, http://groups.yahoo.com/group/Esperanto_amatoroj/; dj4pg@t-online.de.

22: Esperanto-Renkonto de Okcidenta Rio. Escola Municipal Henrique de Magalhães; Rua da Fábrica, 235; Bangu; Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ ekor.esperanto@yahoo.com.br.



28: Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando, kun prelegoj, filmoj, libroprezentadoj ktp. ✉ UEA (v. la kolofonon).

29: Matenkafo de Taguatinga Esperanto-Klubo akompanata de muzik-kantoj, prelegetoj pri laŭvola temo kaj pri novembraj memorindaĵoj, omaĝo al la novembraj datrevenantoj, interkonaj babiladoj kaj trinkado kaj manĝagado, ĉio nur Esperante. ✉ www.taguatek.org.br/; tek.esperanto@ig.com.br.

decembro:

12: AnkRo, Antaŭkristnaska renkontiĝo en Pisek, Ĉeĥio. Tradicia renkontiĝo, ĉi-foje omaĝe al la 150-jariĝo de d-ro Zamenhof. ✉ esperanto.pisek@seznam.cz; pisek@esperanto.cz.

15: Inaŭguro de Zamenhof-monumento en Herzberg – la Esperanto-urbo. ✉ <http://esperanto-urbo.de/blog.php>.

18. Centra jubilea german-pola Zamenhof-festo en Berlin, Germanio. Zamenhoffesto jubilea ĉefe de germanoj kaj poloj, sed malfermita por ĉiuj, sub patronato de pola ambasadoro en Germanio kaj urbeŝtrino de Berlin-Lichtenberg. Organizantoj: GEA,

GEJ, PEA, PEJ kaj aliaj. ✉ Esperanto-Haus, Einbecker Str. 36, DE-10317 Berlin, Germanio. ✉ infozentrum@esperanto.de.



25-27: 32-a jara Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) kaj kvara kunsido de la estraro en Lahore, Pakistano. ✉ Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA), Esperanto Markaz, Chowk Shahidan, Multan, Pakistan. ☎ +92(0)61-4517676. ✉ www.pakesa.org/, pakesa@yahoo.com aŭ pakesa@gmail.com.



26 – 28: Komuna Seminario de Ĉinio, Japanio kaj Sud-Koreio en Nankino, Ĉinio. ✉ ĉeforganizanto Jiang Limin, prez. de Ĉina Junulara E-Asocio. ✉ http://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_Seminario;lamondo@163.com.

27: Kunfratiĝa Tagmanĝo de Taguatinga Esperanto-Klubo, akompanata de muzik-kantoj, prelegetoj pri laŭvola temo kaj pri decembraj memorindaĵoj, omaĝo al la decembraj datrevenantoj, interkonaj babiladoj, ĉio nur Esperante. ✉ (v. 29 nov).

27 dec – 03 jan: JES, Junulara E-Semajno en Zakopane, Pollando. ✉ <http://jes.pej.pl/>.



27 dec – 03 jan: 26-a IF – Internacia Festivalo kun 3-a Internacia Vintra Universitato, en la bavara Nördlingen, Germanio. La plej fama aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: "Fabeloj". Tuttaga ekskurso al Nürnberg (la urbo de la unua E-Grupo). Plilongiga eblo ĝis la 4-a de januaro. ✉ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49 56248007, ☎ +49 1714964558, ✉ www.internacia-festivalo.de; HDP@internacia-festivalo.de.

internacia-festivalo.de.

27 dec – 03 jan: Novjara Internacia Semajno (NIS) en Saarbrücken, Germanio. Por junuloj kaj junaj plenkreskuloj. Ĉe la franc-germana landlimo, paralele al la 8-a Novjara Renkontiĝo (NR). ✉ Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ✉ www.esperantoland.org/nis/; lu.esperantoland@gmx.de.

27 dec – 03 jan: Novjara Renkontiĝo (NR) en Saarbrücken, Germanio. Por infanoj, familioj kaj aliaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. ✉ Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ✉ www.esperantoland.org/nr/; lu.esperantoland@gmx.de.

31 Silvestra festeno en Grezjono, Francio. Venu maskovestita! ☎ 09 51 64 10 34 aŭ 05 55 03 62 23. ✉ bourdet.andre@gmail.com.



januaro:

07-11: Novjara Renkontiĝo de Brazila Esperantista Junulara Organizo en la urbo Charqueada/SP, 180 km de la ĉefurbo San-Paŭlo. ✉ <http://bejo.esperanto.org.br/>, bejoesperanto@yahoo.com.br.

10-23: Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro 2010 en "International House", la loĝejo de studentoj de la Universitato de Sidnejo en la urbocentro. Lecionoj, plaĝo, sportoj, Festivalo de Sidnejo kun artistoj en- kaj eksterlandaj. ✉ www.aesk.esperanto.org.au; aesk@dodo.com.au.

10-31: Malkovru la misteran landon "Angolo". Itineo: Luanda-MbanzaKongo-Benguela-Lobito-Huambo-Lubango. Vizitu kune kun ni Angolon, landon kiu disvolviĝas mirakle. ✉ Afrika Turismo Servas, ul. Siekiewicza 18A, Zielonka, Pollando. ✉ afrikaturismo@yahoo.fr.

26-29: Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Wellington, Nov-Zelando. Eksterlandaj esperantistoj estas bonvenaj. ✉ www.esperanto.org.nz.



14: Esperanto-Maskerada Kompanio "Paždroć" ĉe Internacia Karnavala Parado en Rijeka, Kroatio. Vi povas aliĝi al Esperanto-karnavala grupo kaj ĝui karnavalon kiel partoprenanto aŭ spektanto. ✉ Esperanto Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio. ☎ www.esperanto-rijeka.hr/; esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

27 feb – 06 mar: Mediteranea Esperanto-Semajno en komforta hotelo "Le Renouveau" en Agay (ĉe Saint-Raphael), apud Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj, en suda Francio. Matene trinivelaj kursoj, studado, promenado, familia vivo, vespere animado. ✉ Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio. ☎ (33)4 94 83 06 88. ✉ prezmoni@hotmail.com.

marto:

31 mar – 06 apr: Internacia Junulara Festivalo. ☎ <http://iej.esperanto.it/ijff/>.

aprilo:

02-04: 4-a Sabla Printempo. Komuna aranĝo de Ĉeĥa E-Asocio, Ĉeĥa E-Junularo kaj E@I. Trejnseminarioj kaj prelegoj pri diversaj temoj kadre de "Esperanto kaj Interreto". Solena inaŭguro de ekspozicio pri Esperanto en la urba biblioteko. ☎ [pisek@esperanto.cz](http://pisek.esperanto.cz).

03-04: Verda Domo de Arizono, Usono. Printempa renkontiĝo, ideala por familioj. ✉ Angelina Taremi, ✉ angelinata@aol.com.



29 apr – 09 maj: 22-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun belega naturo de Krimeo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. ☎ www.ulej.org.ua/aj/; volodomir@ukr.net.

majo:

14-17: 91-a Brita Esperanto-Kongreso en Llandudno, hotelo Imperial, Norda Kimrio. ✉ Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. ☎ 0845 230 1887, +44 (0)1782 372141. ☎ www.esperantollandudno2010.org.uk/, eab@esperanto-gb.org.

15-17: 7-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto ĉe Tririveroj, Kebekio, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358, de Bordeaux, Montréal, Québec, Canada, H2G 2r8; ☎ www.esperanto.qc.ca/en/; informo@esperanto.qc.ca.

27-31: Rusia Esperanto-Kongreso, REK-26 en Peterburg. Internacia Esperanto-renkontiĝo kun ĝuado de la belega urbo, de ĝiaj muzeoj, teatroj, katedraloj; ŝipaj promenadoj sur kanaloj kaj sur la rivero Neva... Venu frandi la rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj! ☎ www.reu.ru/index.php?evento=REK-26; kongreso@reu.ru kaj ĉe Anna Butkevič: annaespero@mail.ru.

28-30: Boatado en Ignalina, Litovio. Ĝi okazos en Nacia parko de Aŭkštaitija, Ignalina distrikto. ☎ olga.strojeva@gmail.com, aŭ jolanjo@gmail.com.

junio

19-21: Verda Domo de Arizono. Internacia Montara Tendumo proksime al Granda Kanjono. Dume okazos Indiĝena Indiana festivalo. ☎ Angelina Taremi, angelinata@aol.com.

19-23: 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbatoro, Mongolio.

20: Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. ☎ suchanekj@seznam.cz.

julio

02-10: "SES 2010" – Somera Esperanto-Studado en Piešťany, Slovakio, kun la 3-a renkontiĝo de lernu!-uzantoj. Dum SES 2010 okazos la seminario "Flugiloj de malfacila vento" kaj ekzameno de Komuna Eŭropa Referencadro. ☎ ses@lernu.net.



11-17: 43-a Konferenco de ILEI en la hotelo Canimao, Matanzas, Kubo. ☎ info@ilei.info; www.ilei.info



17-23: Konferenco de OSIEK (IEK) en Herzberg, Germanio, organizata de E-Centro Herzberg, kun temo "Kial Esperanto estas revolucia lingvo?" ✉ Eric Laubacher, ☎ kasisto@osiek.org kaj esperanto-zentrum@web.de.



17-24: 95-a Universala Kongreso en Havano, Kubo.

24-31: 66-a Internacia Junulara Kongreso, Los Cocos, Kubo.

aŭgusto

20-22: 6-a Nordorienta Ĉina Kongreso de Esperanto en Dandung, Ĉinio.

21-28: EKOTUR (Ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj) en regiono de lagoj en suda Ĉeĥio. ✉ KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420257712201. ☎ +420257712126. ☎ www.kava-pech.cz/trip-kaest2008e-esperanto.html; chrdle@kava-pech.cz.

septembro

11: Literumiloj kaj Lingvohelpiloj. Kolokvo/Ateliero en la domo de Andreo Cseh, Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, gvidata de Marek Blahuš (Univ. Brno), Eckhard Bick (E@I-projekto Lingvohelpilo) kaj Toon Witkam (ESPSOF). ☎ www.iei.nl.

19: 13-a ERT – Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga (Braziljo, Brazilo). ☎ tek.esperanto@ig.com.br.

oktobro:

02-09: 18-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en bela mediteranea urbo de la "Costa Brava" (Klifa Marbordo). ☎ 349372750. ☎ luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno>.

09-11: 17-a Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto en Sylver Bay, Lake George, NY, Usono. Amikeca semajnfino, kun kursoj, prelegoj, ludoj kaj multe pli sur belega loko ĉe lago. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358, de Bordeaux, Montréal, Québec, Canada, H2G 2r8. ☎ informo@esperanto.qc.ca.

11-17: InPaSem (Internacia Paroliga Semajno), por komencintoj kaj jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. ✉ KAVA-PECH (v. 21 aŭg 2010).

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:
www.Esperantoland.org.

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj
daŭre konsulteblas ĉe:
www.eventoj.hu/kalendar

Belartaj Konkursoj de UEA: La branĉoj Kanto kaj Filmo

Ne troviĝas en sia kutima loko detaloj pri la branĉoj Kanto kaj Filmo de la Belartaj Konkursoj. Ĉi-jare, pro malbonaj rezultoj en la pasintaj kelkaj jaroj (malmultaj konkursaĵoj, kaj iom malalta kvalito), la Komitato de UEA decidis "suspendi" tiujn branĉojn "en la nuna formo".

Ne vere temas pri tio, ke mankas elstaraj kantoj kaj filmoj en Esperanto, sed ke iliaj kreantoj ne klare scias, ke ili rajtas konkursi per ili, aŭ entute ne venas al ili la ideo konkursi. Ĉar ni volas povi premi la plej indajn verkojn, en la venonta jaro oni eksperimente rajtigos la juĝantarojn en tiuj du branĉoj mem elserĉi premiindajn verkojn kaj inviti iliajn kreintojn partopreni la konkurson. La verkoj povos esti publikigitaj aŭ nepublikigitaj: tio ne gravas. Ni ne forigos la eblon, ke kreantoj de kantoj kaj filmoj mem proponu siajn verkojn: restos la "normala" metodo anonci sin; sed ni ne limigos nin al la sinancoj.

Inter la defioj frontataj de la Belartaj Konkursoj estas la rapide ŝanĝiĝanta teknologio, kiu transformas certajn ĝenrojn preskaŭ preter rekono – en kunligo kun egale rapide ŝanĝiĝantaj ĝenraj normoj. La Branĉo Kanto estis tute klare difinebla kiam oni fondis ĝin – en epoko kiam la diferenco inter "serioza" muziko kaj populara muziko estis tute klara, kiam ĉiu nuanco de verko estis klarigebla per skribita partituro, kaj kiam la diferenco inter publikigita kaj nepublikigita verko estis same klara. Sed kiam ne venis bonaj konkursaĵoj laŭ la malnova stilo, oni komencis akcepti ankaŭ sone registritajn prezentojn de kantoj, kie evidente temis ne nur pri kvalito de la verko mem, sed ankaŭ pri kvalito de prezento (fakte la du fariĝis nedivideblaj). Kompari tian prezenton kun teksto-plus-partituro estas malfacile.

En la komenco de la nova periodo ĉio iris relative bone ĉar almenaŭ oni povis facile distingi inter formale publikigita kaj nepublikigita muzika verko. Tamen, hodiaŭ ne plu klaras la divido inter publikigo kaj nepublikigo ĉar oni povas disvastigi muzikon per interreto kaj ĝin facile elŭti eĉ sen la malnovaj markoj de publikigiteco. Nun, do, la fundamentaj elementoj de la branĉo, tiaj kiaj ili estis iam formulitaj, ne plu validas.

Simile en la Branĉo Filmo. Iam oni facile povis difini filmon kaj videobendon laŭ ties fizika aspekto, kiu same ebligis diferencigi inter publikigita kaj nepublikigita verko. Sed Youtube kaj similaj disvastigiloj forigis la distingon. Iam filmoj rakontis rakonton aŭ dokumentis iun fenomenon, sed en la epoko post la ekesto de, ekzemple, muzikovideobendoj, eĉ tiuj kriterioj ne plu validas.

La juĝantoj do, laŭ la instrukcioj de la Komitato, priatentos "la produktojn aperantajn sur la Esperanto-scenejo en tiuj du branĉoj, kaj se ili opinias iun verkon valora, ili atribuu la koncernan premion" – kompreneble kun la konsento de la aŭtoro.

Ni vidu ĉu tiu nova eksperimenta metodo produktos pli bonajn rezultojn – kaj alportos rekonon al plene meritaj verkoj. Mi aŭdacas esperi, ke jes – sed, se ne, ni estontece esploros aliajn vojojn por rekoni kaj instigi la tamen grandan talenton, kiu troviĝas hodiaŭ en nia Esperanto-movado.

Humphrey Tonkin



La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 61-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 95-a Universala Kongreso en Havano. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por la sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj)

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas 'Luigi Minnaja'

Infanlibro de la jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2009. Unu premio.

Por Filmo kaj Kanto bonvolu legi la apudan artikolon de Humphrey Tonkin, prezidanto de Belartaj Konkursoj, kaj – en kazo de dubo – bonvolu vin turni al la sekretario, Michela Lipari (vidu la adreson sube).

Ĉiujn konkursaĵojn – en unu ekzemplero escepte de tiuj por la branĉo infanlibro – oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio aŭ prefere rete al la adreso: michela.lipari@tiscali.it, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro.

Premioj: unua premio 240 eŭroj, dua premio 168 eŭroj, tria premio 96 eŭroj; nova talento 168 eŭroj; infanlibro de la jaro 504 eŭroj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ ĉe http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html.

Invit' al japaneco


Japanio kalejdoskope. Diversaj aŭtoroj. Ilustris Miyazaki Hideko. Tokio: JEI, 2007. 91p. 21cm. ISBN 9784888870511. Prezo: € 5,40

Eldonite por la partoprenantoj de la 92-a Universala Kongreso (Jokohamo, 2007), ĉi tiu bele kaj abunde ilustrita libreto daŭre validas kiel prezento aŭ enkonduko al Japanio. Simile al la pluraj kajeroj de la serio "Japana esearo" de Libroteko Tokio, ĝi konsistas el kvindek da artikoloj de diversaj enlandaj aŭtoroj pri ĉiaj aspektoj de la vivo de japanoj: naturo, geografio kaj klimato, historio, politiko, ekonomio, loĝantaro (ekzemple, pli ol 20% da olduloj); la japanaj lingvo, skribo kaj literaturo; tradiciaj artoj (kabuko, noo), dancoj kaj muzikiloj (kotoo, ŝakuhaĉo, ŝamisen); pentro-arto kaj ikebano (flor-aranĝo); la kunreligioj; vestoj, manĝoj, alkoholaĵoj, ludoj, sportoj...

Aliaj artikoloj temas pri la historio de la japana E-movado (sed kie nia kara ludovikito?) kaj pri la ZEOj (Zamenhof- kaj Esperanto-Objektoj) troveblaj en Japanio, inter ili 29 sinsekvaj stacidomoj de unu fervoja linio.

Ĉar la aŭtoroj verkis originale en Esperanto, foje legeblas personaj, preskaŭ intimaj informoj, ekzemple de Tazima Mayuko: "Nun ĉiun fojon kiam mi vojaĝas eksterlanden, mi kunportas ŝamisenon kaj ludas ĝin vestinte min per bela kimono".

Fine de la libro aperas listo de ĉiuj japanaj vortoj en NPIV, kiel "cunamo" (detrua ondego), "haŝio" (manĝbastoneto), "jaŝiro" (ŝintoa templo), "torijo" (memstara pordego antaŭ jaŝiro), "zorior" (speco de sandalo) ktp. Apud "aino"/"ajnuo" (ĉu vere "japanaj"?), presiĝis la misformo "ajno", miascie netrovebla en ajna loko de NPIV; cetere, kial ne skribi simple "Fuĵio" anstataŭ la peza paŭsaĵo "Fuĵi-monto"? Plaĉas la pli homvarma difino de "ĉanojo": "regali gastojn per teo". Ankaŭ la informo, ke NPIV, kompare kun PIV, tro strikte difinas "suŝio" (tamen oni ne diras, ke suŝion oni manĝu prefere fingre, ne haŝie). Krome utilis listo de japanajoj mankantaj tiuvortare, kiel la supre menciita "ikebano", "hibakuŝo" (viktimo de atombombo), "karaoko", "mangao" (speco de komikso), la luktosporto "sumoo", "ŝinkanseno" (kuglotrajno), aŭ la ne-japanlingva "niktereŭto" ("prociona hundo"); ja plurajn el tiuj vortoj oni facile renkontas i.a. en la Esperanta vikipedio.



Cetere menciindas, ke por konceptoj kiel "sakeo" kaj "goo" iuj ĉinaj aŭtoroj preferas uzi radikojn ne japanajn, respektive "(riz) vino" kaj "vejĉio" (el la ĉina).

Jen kaj jen oni mencias verkojn jam publikigitajn en Esperanto pri la traktataj temoj, tamen ne *Neĝa lando* de Kaŭabata Jasunari aŭ *La flambirdo* de Tezuka Osamu. Konkrete pri literaturo, la artikoloj pri hajko kaj tankao ne diras, ke en la japana lingvo tiuj poemformoj ne havas rimojn, dum en Esperanto, laŭ longa tradicio fare de japanaj kaj alilandaj poetoj, – prefere jes.

Koncerne la enhavon mem, nur mallonge oni legas pri la masakroj de civiluloj fare de japanaj soldatoj dum la dua mondmilito ("Mortis multaj soldatoj, kiuj mortigis ankaŭ alilandajn soldatojn kaj civitanojn") aŭ pri la amasbuĉado de japanaj civiluloj fare de usonaj atombomboj en Hiroŝimo kaj Nagasako, sed eble pri tio oni legu alilibre.

Kaj rilate la t.n. orientan medicinon, bonvenus iom da kritiko ekzemple pri akupunkturo: la sola ago piki per pingloj favoras la naturan produktadon de bonfartigaj substancoj, sendepende de tio ĉu oni punkturas sur la tradiciaj kuracpunktoj aŭ aliloke.

En la artikoloj pri kaligrafio kaj pentro-arto gravas la distingo disde la t.n. okcidentaj ekvivalentoj; same pri arkpafado, kiun oni komparas kun zeno. Simile okazas pri religioj, komprenataj ne nur kiel abstraktaj kredoj aŭ dogmaroj, sed kiel praktikoj, kun rutinoj kaj ritoj: "ĝeneralaj japanoj preĝas en sanktejo laŭ ŝintoismo en novjara tago kaj havas funebrojn laŭ budhismo". Jen, laŭ mi, la plej interesaj kaj instruaj partoj de la libro: tiuj, kiuj helpas kompreni la apartajn kondutojn kaj sintenojn de japanoj. Ĉi-kampe mi ŝatintus legi pri la japanaj ĝentilo kaj afablo. Kaj, se diri la veron, espereble oni iam tradukos kaj publikigos verkojn kiel *Laŭdo de ombro* (de Tanizaki Junichiro, pri la japana estetiko), aŭ la franclingva *Enkonduko en la japanan kulturon* (de Hisayasu Nakagawa), aŭ eĉ la polemika romano *Stuporo kaj tremoj* de Amélie Nothomb... Sed mi finu ĉi tie, ĉar mi ne rajtas peti tro de tiu ĉi sendube rekomendinda libreto.

Jorge Camacho

Ege dankindaj kontribuaĵoj por celebri la centan datrevenon

Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Rotterdam: UEA 2008. 126p. 24cm. Ilus. ISBN 9789290171058. Prezo: € 15,00. **La Asocio. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA.** Ziko van Dijk. Antverpeno: FEL, 2008. 301p. 21cm. Ilus. ISBN 9789077066379. Prezo € 22,80.

La centjariĝo de Universala Esperanto-Asocio estas plej atentinda motivo por aktivigi esperantistajn historiistojn. La du libroj ĉi tie menciitaj, eldonitaj lastjare, estas atestoj pri tiutemaj kontribuaĵoj de Ulrich Lins kaj Ziko van Dijk. Tiuj libroj de niaj plej elstaraj historiistoj lumigas gravajn periodojn kaj epizodojn, instituciojn kaj personecojn en la historio de UEA. Ili estas ege bonvenaj kaj dankindaj informiloj kaj komprenigiloj por la asocioj, kaj certe sufiĉe plenaj por la plej multaj, malgraŭ la atentigo de Lins en la enkonduko de sia libro: "Plena analizo de la historio de UEA estas tasko farota".

La libro de Ulrich Lins konsistas el tri analizaj kontribuaĵoj. La unua resumas la historion de la centjara asocio, la ceteraj du koncernas la du personojn, Hector Hodler kaj Ivo Lapenna, kiuj "komence kaj dum granda parto de la ekzistado de UEA profunde influis la asocian farton", kiel diras Lins en la enkonduko. Krome estas aldonitaj listoj de la prezidantoj de UEA, ĝiaj direktoroj kaj la redaktoroj de Esperanto, kaj Kroniko de la Esperanto-movado ekde 1959 ĝis 2005. Pri Hodler kaj Lapenna temas ankaŭ gravaj partoj de la libro de Ziko van Dijk, kio ankoraŭ pli akcentas la gravecon de tiuj du homoj en la historio de UEA.

Lins komence citas la kvinan punkton de la Deklaracio de Bulonjo, ke esperantisto povas nomi sin "ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas". La aŭtoroj de la Deklaracio evidente volis eviti, ke la nomo "esperantisto" ne estu tro idealisme ŝarĝita. Lins atentigas, ke tiu difino ne tute kongruis kun la idealo de la interna ideo laŭ la kompreno de Zamenhof, kaj kiun Hodler certe atendis, ke la membroj de UEA respektos, paralele kun sia laborado por la disvastigo de Esperanto. Ĉu la idealisma vejno de la komenca UEA do forneis iusence la neŭtralecan sintenon de la Deklaracio? Lins tion ja aludas: "UEA tiusence ne estis plene neŭtrala; ĝi ne rilatis indiferece al la demando por kiu celo uzi Esperanton." Tiu penso estas interesa en rilato kun la ĝenerala proklamo de UEA pri neŭtraleco kiel gvida principo tra sia historio, principo, kiu neeviteble invitis al diskutoj kaj skismaj minacoj depende de la cirkonstancoj. Esence, tamen, la idealo de internacia pensmaniero ankoraŭ bone vivas en la funkciado de UEA, malgraŭ ŝanĝitaj tempo kaj cirkonstancoj. La espero de Hodler, kaj sendube ankaŭ de Zamenhof, ke Esperanto kapablos

iel ŝanĝi la mondon, antaŭ longe ja forvanuis, kio tamen ne reduktis la interefikadon de idealismo kaj praktikado, kiu ekde la komenco difinas la rolon de UEA kiel la ĉefa kuniga forto de esperantistoj internacie. Tial la titolo de la libro de Lins: *Utila Estas Aliĝo*, estas kaj konvena kaj aktuala.

Lins modeste nomas la kontribuaĵon *Tra la unua jarcento de UEA* provo "mallonge resumi la historion de la centjara UEA".

Fakte ĝi estas belstila konciza kaj ekvilibre aranĝita priskribo de tiu historio, laŭtempe dividebla en kvin periodojn: la komencaj jaroj antaŭ la unua mondmilito, la militaj jaroj, la intermilitaj jaroj, la dua mondmilito kaj la moderna periodo. La leganto facile sekvas tiun evoluon, kiu similas al vojaĝo de modere ekipita velŝipo tra vasta maro, iaforte en favora vento, iaforte drivanta kun ferlitaj veloj, iaforte minacata de danĝeraj rifoj. La ekiro estis bonaŭgura, la kapitano decidema kun vizio, la ŝipanoj fervoraj volontuloj: Hector Hodler kun sendependaj individuaj membroj pretaj oferi siajn fortojn en praktiko. Favoris la vento, en 1914 la membronombro de UEA atingis pli ol sep mil,

45 000 praktikaj servoj plenumitaj per la "konsula" aŭ delegita reto, la solidariga faktoro en la asocia strukturo; la Ido-krizaj rifoj jam post la pobo. La mondmilita uragano trafis la ŝipon katastrofminace, sed la kapitano restis firma ĉe la stirilo kaj mobilizis la jam bone funkciantan organizon por serĉi kaj savi viktimojn el la furioza maro. Pruviĝis la stabileco de la ŝipo, ĝi estis preta daŭrigi la vojaĝon kun kreskanta optimismo, malfermiĝis novaj perspektivoj utiligendaj helpe de kreskanta rekono pro la dummilita helpagado. Grava perdo estis la morto de la kapitano, sed lia amiko Edmond Privat, ankaŭ homo kun vizio kaj praktikaj talentoj, estis firme decidema utiligi la ŝancojn, kiujn devus proponi la fondo de Ligo de Nacioj. Li transprenis la kapitanecan de la UEA-ŝipo kvar jarojn post la morto de Hodler kaj dum multaj jaroj aktivigis la kampanjon, kiu devus konduki al ĉiam pli glata vojaĝo sur ĉiam pli paciĝanta maro.

Bedaŭrinde tiu optimismo ne donis la atenditajn

rezultojn. La idealismo de Hodler, ke la esperantistoj pioniru edukon al internacia pensmaniero, perdis sian elanon, naciecaj influoj komencis influi la agadon de UEA. Strukturaj ŝanĝoj sekvis, la ŝipo pluvelis, nun sub du nomoj, UEA kaj IEL, kaj plimalpli baraktis tra la tumultema maro intermilitaj kaj dum la dua mondmilito. Fine, du jarojn post ĝia fino, tiu duvizaĝa aspekto



fokusigis en unu kaj UEA estis konfirmita kiel la sola internacia, neŭtrala organizaĵo de la esperantistoj, kun strukturo simila al la ĝistiam Internacia Esperanto-Ligo. Ekestis nova periodo en la historio de UEA, kiun oni povas nomi la moderna, sub gvido de novaj homoj, novaj kapitanoj de la longe pribatita ŝipo, homoj de elstaraj organizaj kapabloj: Ivo Lapenna kaj poste Humphrey Tonkin.

La du ceterajn kontribuojn pri du elstaraj personoj en la historio de UEA, Hector Hodler kaj Ivo Lapenna, karakterizas la sama flua kaj klara stilo kiel la prihistorian kontribuojn. Lins konvinke argumentas, ke la heredaĵo de Hodler, kristaligita en ĉi ties vortoj, ke "Esperanto 'triumfas' ĉiujfoje kiam ĝi servas al iu", restas daŭre la fundamento de UEA. Hodler aldonis praktikismon al la idealismo de Zamenhof sen malgravigi la esencon de lia idealismo. Li donis ideologion al la ideo de la t.n. esperantismo, radikanta en la Bulonja spirito de 1905. Tiu ideologio kombinas praktikajn servojn kaj idealismajn celojn, kio ja konsistigas ankoraŭ hodiaŭ la karakteron de UEA, malgraŭ la haoseco de nia postmodernisma tempo.

Lins anoncas en la enkonduko, ke en lia traktaĵo pri Ivo Lapenna lia intenco ne estas resumi ĉiujn atingojn de Lapenna en la Esperanto-movado, sed ke per biologia alproksimiĝo li celas "ilustri ankaŭ la politikan ideologian fonon, sur kiu disvolviĝis la agado de UEA dum kelkaj jardekoj." Tiun metodon Lins perfekte plenumas kiel atendeble. Mi nur volas iom komenti pri kelkaj punktoj, kiujn oni povas rigardi pli kiel psikologiajn ol biologiajn.

Lins skribas epiloge: "Ivo Lapenna estis fascina persono, interalie pro siaj kontraŭdiroj." Supozeble kontraŭdiroj estas konstatablaj ĉe plej multaj homoj kaj ili ja povas fascini iliajn kunhomojn, precipe en kazoj de homoj multflanke eksterordinaraj, kia ja estis Lapenna. Probable la vivo kaj kariero de Ivo Lapenna povus servi kiel bona ekzemplo de tiu konata fenomeno. Lins ekzemplas liajn kontraŭdirojn resume: lia apero kiel porparolanto de la komunistaj esperantistoj en la 32-a UK en Bern; lia energia neo en la konflikto kun Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko de kiu ajn favoremo al komunismo; kaj ke ekde 1974 li uzis kontraŭ UEA argumentojn parte tre similajn al tiuj, kiujn dudek jarojn antaŭe uzis kontraŭ li la ĝenerala sekretario de EANA, G.A. Connor. Lins asertas, ke Lapenna "kaŝis" siajn kontraŭdirojn "asertante ke li ĉiam batalis por la homa libereco kaj kontraŭ diktatoreco". Nu, eble jes. Sed ankaŭ eblas, ke li konsideris tiajn kontraŭdirojn nur kiel akcepteblajn personajn evoluajn etapojn, kiuj koncernas neniun krom lin mem.. Ke tio tamen povas konduki al konfliktoj depende de cirkonstancoj, karakteroj kaj temperamentoj estas alia historio.

La subtitolo de *La Asocio* de Ziko van Dijk: *Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA* donas la impreson, ke ties stilo povus esti ia kombino de ĵurnalisma metodo kaj historiista esploro. La disdivido de la ĉefaj temoj en titolitajn subtemojn kaj mallongaj dikliteraj enkondukoj al temoj faciligas la legadon, kaj vigla stilo, kiu je okazoj ne evitas personajn sintenojn, kaptas kaj tenas la atenton de la leganto. Evidenta estas la multa kaj zorga esplorklaboro de la aŭtoro, kion ebligis lia profunda kono de Biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA, pri kies aranĝo kaj ordigo li longtempe laboris, utiligante la vesperojn por privataj esploroj pri la historio de la Asocio. Tiel estas konvene, ke la plej longa ĉeftemo de la libro de Ziko van Dijk estas la Biblioteko mem, ĝia

historio tra tri periodoj: svisa, svis-brita kaj nederlanda. La aŭtoro akcentas la ligan de la biblioteko al la evoluo de la Asocio kaj sekvas la rilatojn inter tiuj du tra la tempo; sufiĉe komplika historio de libroj kaj homoj ĝi estas ĝis la definitiva statuta decido nur en 1980 pri la oficiala nomo de la biblioteko. Dua ĉeftemo koncernas la organizajn problemojn kaj la statutojn de UEA, do aferojn de la esperantista komunumo, almenaŭ kiel ĝi koncernas la organizon de UEA, disde la lingvo mem. Ziko atentigas pri tio, ke oni ĝis nun malmulte studis la esperantistan komunumon kaj listigas multajn esplor-dezirindaĵojn, interalie eldonon de historiaj statutoj de UEA. La nuna studo de li mem estas grava kontribuado tiutema kaj necesa legaĵo por tiuj, kiuj elektigas por okupi sin pri organizaj taskoj kaj problemoj de la Asocio, ne malplej la Komitatanoj.

Tre interesa estas la ĉapitro pri la libroj diverstempe verkitaj pri la historio de Esperanto. Ne malpli ol 23 tiaj verkoj estas listigitaj, pritraktitaj kaj kritikitaj de nia aŭtoro, ekde 1903/94 (de Beaufront) ĝis 2005 (Korjenkov). Du estas komunaj verkoj de kelkaj aŭ multaj aŭtoroj (*Enciklopedio de Esperanto*, *Esperanto en perspektivo*), iuj celas kursojn kaj ekzamenojn, aliaj estas ĝeneralaj, iuj estas en naciaj lingvoj ktp. Plej multaj el la unuaŭtoraj historioj ricevas pli-malpli negativan kritikon de nia historiisto. Aparte grava mi trovas lian kritikon de *La fenomeno Esperanto* de Auld (1988), ke tie troveblaj asertoj "kreskigas certan negativisman kaj amaran sintenon ĉe la leganto". Li citas la lastan frazon de la libro kiel resumon de tia negativismo: "Se la historio instruas al ni ion ajn, ĝi instruas jenon: en tiu ĉi mondo Esperanto tre malofte ricevis eĉ minimumon da normala justa traktado". Nu, Auld ne estas la sola Esperanto-poeto, kiu esprimis sian amarecon, sed la kritiko de Ziko estas pripensinda, ekstremaj asertoj koncerne Esperanton estas evitendaj, ĉu negativaj, ĉu pozitivaj.

Entute la libro de Ziko van Dijk enhavas 13 gravajn studojn pri notindaj eventoj kaj personoj kaj donas ampleksan superrigardojn de la multvariaj flankoj de la historio de la Asocio. Mi tamen volas menci, ke mi persone sentas mankon de pritrakto de la klopodo difini iom precize la kulturpolitikon de UEA komence de la okdekaj jaroj. Sed estu kiel ajn, ne estas eble ĉion trakti, kaj certe ne ĉiujn studojn de la libro en mallonga recenzo. Samoj validas pri la verko de Ulrich Lins. Tiuj du libroj estas ege dankindaj kontribuoj por celebri la centan datrevenon de la fondiĝo de nia Asocio. Ili subtenas unu la alian, plifortigas la konscion de la esperantistoj pri la graveco de la laboro de niaj historiistoj. Dankojn kaj gratulojn!

Baldur Ragnarsson

Estas tempo rekotizi por 2010!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de tiu ĉi revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Red. Ilona Koutny. Poznań: ProDruk & Steleto, 2009. 407p. 24cm. Ilus. ISBN 9788361607328. Kvindek kontribuantoj de pli ol 40 aŭtoroj. € 24,00

Babiladoj de bonhumora Zamenhofano. Jakobo Ŝapiro. Postparolo de Tomasz Chmielik. Czeladź: Hejme – Libro-mondo, 2009 (2a eld.). 40p. 19cm. ISBN 9788392028970. "Ĉiu vorto en la libreto estas amuza, la ŝercoj tre spritaj, krom tio ili estas esperantaĵoj ĉiam trafaj, sed neniam ofendaj" (Marie Hankel). € 2,40

Ĉio komenciĝis ĉe la Verda / Zaczęło się na Zielonej. Pri Ludoviko Zamenhof, lia familio kaj la komenco de Esperanto / O Ludwiku Zamenhofie, jego rodzinie i początkach esperanta. Zbigniew Romaniuk, Tomasz Wiśniewski. El la pola trad. P.

Wierzbowski. Łódź: Księży Młyn Dom Wydawniczy, 2009. 2x50p. 24cm. Bind. Du-lingva (pola, Esperanto). ISBN 9788361253617. Konciza, sed bone dokumentita verko, celanta unuavice pollingvanojn. € 8,40

Ekonomia krizo. Analizo n-ro 1. Jörg Goldberg k.a. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2009. 57p. 21cm. ISBN 9782928300090. Ĉu kaj kiom la aktuala ekonomia krizo signifas novan historian cezuron en la evoluo de la kapitalismo? € 7,50

El la akaŝo-kroniko. Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2009. 169p. 21cm. Spiritosciencaj (okultaj) vidpunktoj pri la origino de la tero, pri la evoluo de la homo, pri vivo ekstertera. € 12,90

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Ivo Lapenna.

Rotterdam: UEA, 2009 (2-a eld.). 166p. 21cm. ISBN 9789290171102. Paroladoj pri Esperanto, Movado kaj kelkaj aspektoj de nia lingvo kaj kulturo. € 9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Filozofias koloroj. Misa Aihara. Tokyo: New York Art, 2009. 47p. 23cm. Tri-lingva eldono (japana, angla, Esperanto). ISBN 9784902437379. Koloraj reproduktaĵoj laŭ pentraĵoj de la aŭtorino, kun klarigoj pri ŝia artfilozofio. € 18,30

Formiko. Hans Jasik. Oosaka: Riveroj, 2009. 145p. 21cm. ISBN 9784947691224. Trideko da facile legeblaj mallongaj prozaĵoj. € 6,90

Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof. Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado / Kaunas: Sezonoj / Litova E-Asocio, 2009. 320p. 21cm. Bind. ISBN 9786099508702.



Nova biografio de la iniciatinto de Esperanto, publikigita



okaze de la 150-jariĝo de lia naskiĝo. € 27,00

Interkomunikaciaj variacioj. D. Blanke, S. Fiedler, J. Wells, V. Barandovská-Frank, W. Bormann. Red. Joanna Lewoc. Göttingen: Leins, 2008. 123p. 21cm. ISBN 9783932975035. La tekstoj de 6 prelegoj prezentitaj kadre de la "Eŭropa Jaro de la Lingvoj" okaze de konferenco en Herzberg. € 12,00

Kafejo. Hans Jasik. Oosaka: Riveroj, 2009. 123p. 21cm. ISBN 9784947691231. Manpleno da originalaj rakontoj facile legeblaj. € 6,90



**Kongresa libro de
Universala Kongreso.**
Rotterdam: UEA, eldonata
ĉiujare. 144p. 21cm. Kun
fotoj. ISSN 00833851.
Manlibro kun detala programo
pri UK kaj adresaro de
partoprenantoj. € 6,90

Kromeseoj. Tacuo Huĝimoto.
Oosaka: Riveroj, 2009. 125p.
21cm. ISBN 9784947691255.
Pli ol 10 eseoj diverstemaj,
kies komuna fadeneno estas
Esperanto. € 6,90

Kvazaŭ ĉio dependus de mi.
Trevor Steele. Antverpeno:
FEL, 2009. 342p. 21cm.
ISBN 9789077066416. Ĉi tiu
romano baziĝas grandparte sur
la vivo de Carl von Ossietzky,
unu el la fruaj viktimoj de la
plej fia reĝimo en la homa
historio. € 18,30

Labirinto / Labirint. Ljubov
Vondroušková. En Esperanton
trad. J. Krolupper. Brno:
RKOSM, 2009. 59p. 17cm. Du-
lingva eldono (rusa, E). ISBN
9788086787428. 26 mallongaj,
rimaj kaj ritmaj poemoj. € 4,50

**Lee Chong-Yeong, gvidanto
nia.** Red. Kim Uson, Choe
Taesok, Song Ho-young.
Seulo: Korea E-Asocio,
2009. 280p. 23cm. Ilus. Bind.
kun kromkovrilo. ISBN
9788997282701. Memrolibro
honore al unu el la plej influaj
koreaj esperantistoj. Aldone al
materialoj pri la vivo kaj agado
de Lee, la libro enhavas ankaŭ
ĉapitron pri liaj verkoj kaj
kontribuadojn de diverslandaj
esperantistoj, kiuj konis lin.
€ 10,20

Maigret eraras. Georges
Simenon. El la franca trad.
D. Luez. Kaliningrado:
Sezonoj, 2009. 127p. 20cm. La
fama franca komisaro havas
komplikan problemon. Tamen,
kiel ĉiam, li sukcesas. € 12,00

**Medicina parazitologio.
Ektoparazitoj kiel**

malsanotransigantoj. Rüdiger
Sachs. Göttingen: Leins,
2004. 36p. 21cm. Ilus. ISBN/
ISSN 3932975189/16157370.
Reviziita teksto de kurso
prezentita en Borgo Maggiore
en 1988. € 6,90

**Mizero de la filozofio, La.
Respondo al Prudono:
"Filozofio de la mizero".**
Karlo Markso. En Esperanton
trad. V. Lutermano. Embres-
et-Castelmaure: MAS,
2009. 196p. 21cm. ISBN
9782918300083. Respondo
verkita en la vintro 1846-47
al studaĵo de Pierre Joseph
Proudhon de 1846. € 16,20

**Paul Harris, pioniro de nova
mondo.** Laurent Dareau. Trad.
el la franca kaj angla. RADE,
2009. 78p. 30cm. ISBN
978808931215. Bildstria
rakonto pri la fondinto de
Rotario Internacia. € 22,50

Reĝo Maĉjo la Unua.
Janusz Korczak. Ilustris
lernejaj infanoj. El la pola
trad. T. Chmielik. Świdnik:
La tradukinto, 2009. 2-a eld.
174p. 30cm. Kolorilus. ISBN
9788392874003. Maĉjo
10-jara heredas la tronon
kaj enkondukas atentindajn
reformojn. € 16,50

**Renardo Vulpo. Mezepoka
bestepopeo.** El la mezepoka
nederlanda tradukis kaj en
Esperanto prilaboris Pieter Jan
Doumen. Hechtel-Eksel: P.J.
Doumen, 2009. 164p. 21cm.
Flandra bestepopeo el la 13a
jarcento; majstroverko de la
satira arto. € 15,00

Serpentoj en la putro. István
Nemere. Kaliningrado:
Sezonoj, 2009. 184p. 20cm.
Terorismo, Al-Kaida,
fanatikeco (ankaŭ ĉe la polica
flanko), surprizoj.
€ 18,00

**Terorismo de Usono
kontraŭ Kubo, La — La
Kuba Kvinopo.** Div. aŭtoroj.

Kompilis Salim Lamrani. El
la franca kaj hispana trad. div.
Embres-et-Castelmaure: MAS,
2009. 232p. 21cm. ISBN
9782918300106. En la lastaj
50 jaroj la rilatoj inter Usono
kaj Kubo estas regataj ne de la
forto de la juro, sed de la leĝo
de la pli forta. € 18,00

Verdeskaj pensoj. Georgo
Handzlik. Bielsko-Biala:
KLEKS, 2009. 133p. 20cm.
Aldone al la aforismoj de la
aŭtoro, antologieto de aforismoj
de aliaj esperantistoj. € 6,00.
Triona rabato ekde 3 ekz.

Verkoj de Nakamura Hideo.
Kompilis Kaba Toyohiko.
Oosaka: Riveroj, 2009. 167p.
21cm. ISBN 9784947691248.
Pensoj pri la vivo antaŭmilita,
pri Esperanto kaj aliaj temoj;
parto de la tekstoj estis verkita
originale en la japana kaj
aperas en ĉi tiu volumo en
Esperanta traduko danke al
Tacuo Huĝimoto. € 8,70

DISKOJ

Aventur'. Kapriol'. Terband:
TRbandstudio, 2009. 57min. Kun
tekstobroŝuro. 14 pecoj balfolkaj.
La grupo ludas malnovan
muzikon sur novaj muzikiloj
kaj memfaritan muzikon sur
malnovaj muzikiloj. KD. € 15,00

**De folkloro ĝojo ĝis opera
kortuŝo / Od radości folkloru
do wzruszeń opery.** Kantas
Joanna Albrzykowska-Clifford.
38min. 9 klasikmuzikaj pecoj de
Kálmán, Webber, Dostal, Verdi,
Schubert k.a. Unu kanto en
Esperanto. KD. € 7,50

**Novaj fabeloj pri Ursido
Pu kaj Porketo.** Verkis kaj
rakontas Julia Sigmond. Cluj-
Napoca: La aŭtoro, 2009.
80min. 12 fabeloj inspiritaj de
Winnie-la-Pu. KD. € 9,00

Teneraj rigardoj. Helena
Dobaczewska-Skonieczka. Legas
la aŭtoro. Bydgoszcz: Skonpres,
2009. Voĉlegita versio de la
poemaro samtitola. KD. € 5,10



ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: € 45,00. Triona rabato sendepende de kvanto dum la tuta novembro.

Oficiala informilo

DONACOJ

Ĝis la 15-a de oktobro

Ĝenerala kapitalo: Nederlando: T.V. Woerden-vd Graaf (finheredaĵo) 111,33. *Sumo ĉi-jara:* 11 8591,57.

Konto Afriko: Britio: A. & T. Page 18,00. Italio: S. Lamberti 51,00. Nederlando: C. & R. Bosson; G.C.A.M. Dercks - po 25,00; W.A. Massar-van Diepen 50,00. Svedio: J. Hammarberg 9,86. *Sumo ĉi-jara:* 1 950,87.

Fondaĵo Ameriko: Usono: D. Charters 100,00. *Sumo ĉi-jara:* 3 018,46.

Fondaĵo Azio: Japanio: Anonima 34,39. Koreio: G. Bak; S-h. Bak; J-s Chang; Y-s Choi; A-j. Chong; H-j. Chong; M-h. Chong; S. Hong; H. Im; H-s. Kim; I-s Kim; J-i. Kim; U-s. Kim; H-h. Lee; H-i. Lee; J-k. Lee; S-w. Lee; Y-w. Lee; Y-t. Ma; H-k. Min; J-j. Min; S-m. Oh; H-c. Park; J-y. Park; M-s. Park; Y-s. Park; S-j. Yang - 270,00. *Sumo ĉi-jara:* 2 274,48.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrio: U. Stecher 20,00. Brazilo: Anonima 720,00. Italio: S. Lamberti 100,00. Svislando: S. Brun 30,56. Div. malgrandaj; 0,46. *Sumo ĉi-jara:* 4 592,77.

Volontula Fondaĵo: Aŭstrio: S. Stamm 20,00. Aŭkcio en la 94-a UK: 3579,59. *Sumo ĉi-jara:* 3 949,59.

Ĝenerala kaso: Nederlando: Anonima 237,50. *Sumo ĉi-jara:* 1 060,03.

Al ĉiuj koran dankon! UEA



Paroladoj de Ivo Lapenna

sur 5 KD-oj

- 1: E-o kiel lingva esprimo kaj instrumento de humaneca internaciismo (1987); Lingva diskriminacio (1964)
- 2: 100 jaroj de parola E-kulturo (1987); Parolado dum la solena inaŭguro de la monumento La Espero en Graz (1987)
- 3: Renkonte al la 100-jara Jubileo de E-o (1981); La rezolucio de Unesko, Montevideo (1954)
- 4: Komunikado kaj homaj rajtoj (1984); Kultura valoro de la Internacia Lingvo (1954)
- 5: La Jaro de Internacia Kunlaboro – La Jaro de Internacia Lingvo (1964); La Internacia Jaro de Edukado (1970)

Prezo de unu disko: €13,50 (+ imposto en EU 19%; sendokostoj 10%, minimume €4,00). Rabato de 1/6 ekde 3 diskoj (samaj aŭ ne).

UEA invitas prelegi en la Havana IKU-sesio

Dum la 95-a UK en Havano okazos la 63-a sesio de Internacia Kongresa Universitato.

UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Israelo; rete: amri@huji.ac.il, ĝis 2010-01-31.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponentoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj proponoj ligitaj al la kongresa temo: *Interproksimiĝo de kulturoj en multlingva mondo.*

Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝataj de la IKU-komisiono kaj sekve la Estraro de UEA decidus pri la akceptotaj proponoj. La proponintoj estos informitaj pri la decido ĝis 2010-04-15. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis 2010-05-31, por publikigo en la IKU-libro.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo.

Prelego estos rekompencita per honorario de proksimume 250 eŭroj. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj -resumoj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe

<http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

Sonregistraĵoj de Lapenna serĉataj

En la jaroj 2003-2006 Birthe Lapenna prizorgis eldonadon de kvin kompaktaĵoj, kiuj havas paroladojn kaj prelegojn de ŝia edzo Ivo Lapenna en UK-oj k.a. okazoj (vd. la reklamon ĉi-apude). Por realigi tiun valoran kolekton ŝi kunlaboris kun teknikisto de la Dana Radio, konsiderata eĉ la plej lerta en sia fako, kiu kopiis kaj purigis la malnovajn registraĵojn.

Intertempe s-ino Lapenna plu havis kontaktojn kun la teknikisto kaj kun programisto de la Dana Radio. Ili volonte daŭrigos la laboron per purigado de sonkasedoj kaj magnetofonaj bendoj kun registraĵoj de Ivo Lapenna, por ke la ebloj aŭdi la grandan oratoron per modernaj rimedoj ankoraŭ pli vastiĝu. La radiaj fakuloj pretas ankaŭ serĉi monon ĉe taŭgaj fondusoj por tiu celo. Sekve Birthe Lapenna alvokas tiujn, kiuj posedas tiajn sonregistraĵojn, kontakti ŝin (Grøndalsvej 30, DK-2000 Frederiksberg, Danio; rete: lapenna@mail.dk).

Renkontiĝo en Asten

Esperantistoj el la germana Ruhr-regiono kaj el la nederlanda regiono Eindhoven-Helmond kaj aliaj interesitoj kunvenis la 12-an de septembro 2009 en la vilaĝo Asten apud Helmond.

Jam la kvaran sinsekvon jaron Helmondaj esperantistoj Twan Gremmen kaj Ralph Schmeits gastigis la ĉeestantojn. Dudeko da

homoj el 5 landoj partoprenis en la programo. Ne nur laŭ la deveno sed ankaŭ laŭ la aĝo kaj Esperanto-sperto temis pri tre miksita grupo.

Post la akcepto kun kafo kaj teo la grupo aŭskultis prelegon pri astronomio en salono de loka observatorio. Sekvis vizito al malluma planetario, kiu montris milojn da steloj. Karakterizas Nederlandon, opiniis ne-nederlandanoj pri la impresa planetario, kunflikado el forĵetaĵoj kiel ladskatoloj. Eblis ankaŭ rigardi per profesia teleskopo.

Post la pikniko (alia nederland-karakteriza elemento laŭdire estas mola pano) oni vizitis kariljonon kaj naturan muzeojn. Jes, ankaŭ kariljonoj montriĝis nederland-karakterizaj! Oni eklernis pri la funkciado de sonorilaj horloĝoj. En la natura muzeo-parto videblis konservitaj bestoj kaj ostaroj de bestoj, kiujn oni trovas en la tiea torfmarĉa regiono Peel.

La tago finiĝis per komuna vespermanĝo. La programo donis okazojn por babili. Estis vigla, agrabla kaj stimula renkontiĝo por spertaj kaj ankaŭ por komencantaj esperantistoj.

Twan Gremmen kaj Ralph Schmeits

Konferenco de neregistaraj organizoj en Meksiko

UEA partoprenis la 62-an konferencon de neregistaraj organizoj en la urbo Meksiko, 09.09.09 – 11.09.09.

En la teamo estis Neil Blonstein (UEA-oficejo Nov-Jorko), Martha Cárdenas (estraranino de Esperanto-USA kaj de Meksika Esperanto-Federacio, MEF, Usono), Mallely Martínez Mateos (prezidantino de MEF, Meksiko), Daniel Moreno (ĝenerala sekretario de MEF, Meksiko), mi (Martin Schäffer, ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio) kaj David López Rueda (estrarano de MEF, Meksiko).

La inaŭgura ceremonio okazis la 9-an de septembro en la bela malnova ekskonvento San Hipólito en la centro de Meksiko-urbo. La inaŭguron partoprenis altranguloj kiel Ban Ki-moon, la ĝenerala sekretario de UN, Patricia Espinosa Cantellano, ministrino pri eksteraj rilatoj de la meksika registaro, kaj Jody Williams, ricevinto de la Nobelpremio pri paco.

Por la kongreso ni preparis informfoliojn: La pozicio de UEA pri lingvaj rajtoj, Praga Manifesto kaj adreskartetojn.

Tuj ĉe la komenco ni komencis la laboron, informante la partoprenantojn individue pri la ekzisto de UEA kaj pri Esperanto. Venis ĉirkaŭ 1300 delegitoj de diversaj neregistaraj organizoj el la tuta mondo. La temo de la konferenco estis: "Malarmu nun! Ni laboru por paco kaj evoluigo".

Ĉiu el nia teamo havis proprajn spertojn kaj konversaciojn. Juna advokato de

Kostariko, Roberto Zamora, sciigis ke li jam aŭdis pri Esperanto en la Monda Socia Forumo en Niĝerio. Li tre subtenis la ideon kaj miris ke ankaŭ en la universitato de Kostariko oni povas lerni Esperanton. Neil Blonstein kantis kune kun kelkaj meksikaj volontulinoj kantojn en Esperanto dum la junulara ekspozicio, kiu okazis en la parko Alameda, ni metis flugfoliojn sur oficialan informtabulon kaj malantaŭ ĝi deĵoris kvazaŭ temus pri nia tablo, ni partoprenis kun afiŝo la



Foto: la aŭtoro

pacmarŝon, ekhavis kontakton kun multaj meksikaj organizaĵoj kaj informis la multnombrajn volontulojn. Ekestis ankaŭ kontakto kun lokaj ĵurnalistoj.

Dum la 3-taga konferenco ni babilis kun pli ol 400 personoj individue kaj plej verŝajne aliaj 400 eksciis pri ni pro la flugfolioj kaj informafiŝoj. Entute do tre bona sukceso! Laŭ mia sperto al du argumentoj la personoj estis speciale perceptemaj: 1) Esperanto jam nun

estas bone uzebla kiel dua lingvo post la angla; kaj 2) Esperanto estas bona alternativo kiel internacia lingvo, ĉar pli justa. Nune la malriĉaj landoj ne povas garantii al siaj ŝtatoj lernadon de fremdaj lingvoj aŭ nur je malalta nivelo. Internacia komunikado ne estu privilegio de la riĉaj landoj aŭ de riĉaj homoj. La venontjaran konferencon invitis la registaro de Aŭstralio. Ni partoprenu; eble kun kelkaj novaj ideoj.

Post la konferenco mi havis la okazon partopreni la unuan internacian kongreson de WATUN (Monda Alianco por transformado de la UN). Ankaŭ tie mi parolis kun multaj homoj kaj neniam en mia vivo mi spertis tiom malferman opinion pri la ideo de internacia lingvo.

La partopreno montras kiom gravaj estas tiaj eventoj kaj la laboro de Neil Blonstein en la novjorka oficejo de UEA. Ni subtenu tian agadon!
Martin Schäffer

Modela tradicia semajno en Hispanio

La 17-a Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo (03 - 10 okt 2009) allogis al la apudmara hispana urbo Pineda de Mar apud Barcelono 120 partoprenantojn el 13 landoj.



Bela aŭtuna vetero favoris la aranĝon, sed precipe la duontagajn kaj unu tuttagan ekskursojn al muzeoj kaj historiaj lokoj de la regiono. Pri poŝtarto prelegis Wolfgang Guenther, pri florkulturado Guillem Micólas, pri Popolstilo en la poezio de Lorca Antonio Marco, pri la natursciencoj en PIV Claude Roux. Katalin Kováts, kiu ricevis la premion "Ada Sikorska-Fighiera", proksimigis la vivon kaj laboron de Vincent Van Gogh. Liba Gabalda prezentis per bildoj kaj filmoj Venezuelon, Rafaela Urueña prelegis pri la tutmonda klimatsanĝo. Stano Marček gvidis rektmetodajn kursojn kaj kantadon, Luis Serrano Pérez reĝisoris diskuton pri la estonteco de Esperanto. Por bone ekkoni unu la alian okazis ne unu, sed du interkonaj vesperoj, kun ĉampano kaj bruligita rumo. Al la bona etoso kontribuis folkloraj vespero kun la muzika ensemblo Montjuic kun lokaj specialaĵoj.

Kubaj esperantistoj renkontiĝis en Granma

De la 17-a ĝis la 20-a de septembro dudeko da esperantistoj el Granma, Guantanamo kaj Havano partoprenis regionan renkontiĝon, organizitan de la provinca filio Granma, laŭ interkonsento de la nacia komitato de Kuba Esperanto-Asocio.

Jaŭde okazis Interkona Vespero ĉe la sidejo de la filio, kiu situas sur la tegmento de la Provinca Kulturdomo. Grupo de esperantistoj laboregis por havi tiun modestan sidejon. Vendrede la partoprenantoj vizitis botanikan ĝardenon kaj promenis tra la urbo, kaj ĝuis koncerton de la muzikensemblo Nulo, gvidata de la esperantisto Raciél Labrada Labaut. Sabate la renkontiĝo daŭris en la muzeo Carlos Manuel de Cespedes, kie la prezidanto de KEA Julián Hernández Angulo informis pri la 94-a UK en Bjalistoko kaj pri preparlaboroj por la 95-a UK kaj aliaj eventoj en Kubo. Anger kaj Frank prelegis pri la urba historio. Sekvis babilado pri la vivo de la movado en diversaj filioj ĉe la riverbordo. Vespere la esperantistino Miriam Casals regalis la ĉeestantojn per boleroj, baladoj kaj kantoj.

Esperantistoj el Bayamo



Marija Pozder Almada (1923-2009) forpasis la 18-an de septembro en San-Paŭlo. Ŝi naskiĝis en hungara familio en Vojvodino, eks-Jugoslavio. En 1962 ŝi edziniĝis al Francisco de Souza Almada, posta Honora Membro de UEA, kaj transloĝiĝis al Santos (Brazilo). Ŝi multe helpis la edzon en lia movada agado, i.a. lige kun la fondo de Brazila Konsilantaro de E-o (1974) kaj la 66-a UK en Braziljo (1981). Ŝi estis estrarano de E-Asocio de San-Paŭlo kaj laste membris en ĝia konsilantaro. Krom dumviva membro de UEA, ŝi membris en Societo Zamenhof ekde ties fondo en 1975, kaj estis delegito kaj fakdelegito pri turismo kaj pentroarto. Pentristino, ŝi estis multjara estrarano de Universala Artista Ligo de E-istoj.



Bijan Ghaznavi (1937-2009) mortis la 27-an de majo en Bienne (Svislando). Kuracisto-psikoterapiisto, li estis estrarano de Bahaa E-Ligo 1988-92.

Keŝav Ram Ĝoŝi (1937-2009) mortis la 23-an de aprilo en Katmanduo. Profesie astronomo, diplomita en Moskvo, li estis fakdelegito pri astrometrio. Li eklernis E-on en 1956 de Tibor Sekelj kaj en 1961 sekvis daŭrigan kurson de Simo Milojević. En la 60-aj jaroj li verkis la unuajn nepalajn lernolibron kaj vortareton de E-o.

Chantal Haren (1947-2009), gvidantino de la E-klubo en Châlons-en-Champagne (Francio) kaj plurjara Patrono de TEJO, mortis la 12-an de julio.

Roger Imbert (1938-2009) mortis la 21-an de septembro en Zagrebo. Laŭdevene franco, li e-istiĝis en 1954. En 1957 li kelkmonate laboris en la Centra Oficejo de UEA. Li membris en la Propaganda Komitato de Unuiĝo Franca por E-o, sed ekde 1960 li vivis en Kroatio, kie li tuj ekaktivis en la



Studenta E-Klubo de Zagrebo, gvidante kursojn kaj tradukante tekstojn por ĝia Drama Sekcio. En Zagrebo li fondis familion kun e-istino el SEK kaj ilia filo denaske parolis E-on. Li kunlaboris kun Tibor Sekelj, kiu volis per novaj metodoj uzi E-on en praktiko. Imbert multe tradukis, i.a. la novelarojn *Songo kaj maldormo sub la karpeneto* (kun Z. Tišljarić, 1972) kaj *Vizaĝoj de Ivo Andrić*, la antologion *Moderna kroata prozo* (1979), kaj la romanon *La derviŝo kaj la morto* de M. Selimović (1990). En la 70-aj jaroj li laboris kelkajn jarojn en Internacia Kultura Servo. Junaĝe li elfrancigis du librojn, el kiuj *Antigona* de J. Anouilh aperis du tagojn antaŭ lia morto. Laŭ lia amiko Z. Tišljarić, "Roger turnis la movadon en Kroatio al uzo de E-o en praktiko; konsekvencoj estis Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kaj, pro ĝi, Internacia Kultura Servo".

Jiří Laube (1923-2009) forpasis la 18-an de septembro en Roudnice nad Labem (Ĉeĥio), kie li estis delegito. Post ses jaroj (1954-60) en malliberejo pro politikaj kialoj li, vivtenante sin kiel helpilaboristo, aktivis por E-o kiel instruanto kaj funkciulo de Ĉeĥa E-Asocio, kies honora membro li estis. En 1986 li organizis siaurbe Internacian Terminologian Kurson, el kiu rezultis *Terminologia kurso* de J. Werner. Interesita pri la kulturaj radikoj de la eŭropa civilizo li verkis *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?* (2008).

Stanisława Nowak-Mehtonen (1928-2009) forpasis la 7-an de majo en Oulu. Polino, ŝi transloĝiĝis al Finnlando renkontinte en la Varsovia UK en 1959 sian estontan edzon Allan. Iliaj du gefiloj estas denaskaj e-istoj. Dum multaj jaroj ŝi estis estrarano de la loka societo.

Lourival Gomes Pinheiro (1919-2009) forpasis la 10-an de junio en Salvador (Brazilo). Profesie optikisto, li movadis kaj gvidis kursojn en Itabuna kaj, post la emeritiĝo, en Rio de Contas, ambaŭ en la ŝtato Bahia.

Jelena Šaponjić (1926-2009) mortis la 15-an de septembro en Beogrado. Ŝi plenumis multajn funkciojn, i.a. kiel prezidanto de la Beograda E-Societo nomita laŭ ŝia patro, la serba pioniro Radomir Klajić, kaj kiel ĝenerala sekretario de Jugoslavio E-Ligo.

Robert Smales (1949-2009) mortis la 12-an de februaro. Li estis vicdirektoro de la Centra Oficejo de E-Ligo de Norda Ameriko 1988-1989.

ABONTARIFOJ 2010

De la Libroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

Revuo	n-roj jare	jara abono
Brita Esperantisto	2	3,00
aerpoŝta aldono (Eŭropo)		3,00
aerpoŝta aldono (ekster Eŭropo)		4,00
Bulgara Esperantisto	4	12,00
Dia Regno (KELI)	6	16,00
ekster Eŭropo		19,00
Esperanto aktuell (germana) ...	6	24,00
Esperanto (revuo de UEA)	11	38,00*
Esperanto, L' (itala)	6	28,00
aerpoŝta aldono		5,00
Esperantolehti (finna)	6	20,00
Espero Katolika	4	29,50
Internacia Pedagogia Revuo	4	18,00
Israela Esperantisto	2	10,00
Jaro, La (agendo)	1	5,50
aerpoŝta aldono		3,50
Juna Amiko (por lernejoj)	3	14,00
Kancerkliniko, La (ajnista)	5	25,00
aerpoŝta aldono		1,00
Kontakto (revuo de TEJO)	6	23,00*
Kosmos (filozofia)	2	8,00
Lang. Problems & Lang. Planning	3	70,00
institucioj		202,00
Laŭte! (libera tribuno)	6	15,00
Litova Stelo	6	14,00
aerpoŝta aldono		6,00
Medicina Internacia Revuo	2	20,00
Monato (novajmagazino)	11	49,00
aerpoŝta aldono	4	,00
(elektronika versio)		29,40
Monde de l'espéranto, Le (franca)	6	30,00
Norvega Esperantisto	6	12,50
Ondo de Esperanto, La	11	38,00
aerpoŝta aldono		5,00
(elektronika versio)		12,00
Scienca kaj kulturo	6	30,00
aerpoŝta aldono		7,00
Spegulo (socikultura)	4	24,00
aerpoŝta aldono (Eŭropo)		6,00
aerpoŝta aldono (ekster Eŭropo)		12,00
Starto (ĉeĥa)	4	10,00
aerpoŝta aldono		3,00
TEJO tutmonde	6	12,00*
Tempo (kroata)	4	10,00

* Abonprezoj de UEA/TEJO-revuoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA.
Por ĉiuj gazetoj la abonantoj en Eŭropa Unio aldone pagas imposton de 6%.
Informoj validaj je 2009.10.14



Hamburgo en retrospektivo.

Ivo Lapenna. Kopenhago: Horizonte, 1977 (dua kompletigita eld.). 11+151p. 21cm. Interpreto de la aŭtoro pri sia forlaso de UEA en 1974. Prezo: €16,50. Sesona rabato ekde 3 ekz.



Kritikaj studoj defede de Esperanto.

Ivo Lapenna. Eseoj pri verkoj de Stalin, Solzbacher, Blanke kaj Forster. Kopenhago: Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, 1987. 57p. 30cm. ISBN 8798233012. €9,60. Sesona rabato ekde 3 ekz.



RETORIKO

Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Bindita kun kromkovrilo. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Paroladoj pri Esperanto, Movado kaj kelkaj aspektoj de niaj lingvo kaj kulturo. La nova eldono enhavas du aldonajn paroladojn neaperintajn en la eldono de 1966. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2009 (dua eldono). 166p. 21cm. Prezo: €9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 28-an de novembro 2009 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



Speciala temo:
IVO LAPENNA

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!




Kongreso sur via koverto!

Glumarkoj (5x4 cm) por la venontjara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 12-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.



Lige kun la centjariĝo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj okaze de la 90-a UK, UEA eldonis historian libron pritraktantan la plej grandan kaj gravan regulan eventon en la Esperanta movado. *Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005*, kompilita de Ziko Marcus Sikosek, estas abunde ilustrita kaj informriĉa verko, havinda por ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de Universalaj Kongresoj. Bindita: €22,50; broŝurita: €16,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

EKSKURSO TRA 100 JAROJ




Okaze de la 100-jariĝo de UEA aperis tiu ĉi abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. Ĝi estas intereskapta enkonduko en la historion de UEA kaj kleriga legaĵo por ĉiu esperantisto. Krom ĝenerala historia trarigardo ĝi enhavas artikolojn pri Hector Hodler, la fondinto de

la Asocio, kaj pri Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. La libron kompletigas laŭjara kroniko, listoj de la prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj, kaj bibliografio.

UTILA ESTAS ALIĜO. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Ilus. Rotterdam: UEA 2008. 126p. 24cm. ISBN 978 92 9017 105 8. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

REMEMOROJ

de
TEODORO SCHWARTZ / TIVADAR SOROS
pri



...la unua mondmilito
MODERNAJ ROBINZONOJ
En la siberia praarbaro
Enkonduko de H. Tonkin.
Berkeley: Bero, 1999
(dua eldono). 9+47p.
22cm. Prezo: €6,00.
Sesona rabato ekde 3 ekz.

...la dua mondmilito
MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO
Nazimondo en Hungario
Redakto kaj komentario de H. Tonkin.
Rotterdam: UEA, 2001
(dua eldono). 318p.
21cm. Prezo: €16,50.
Triona rabato ekde 3 ekz.

